



SPORO LA ĈINIO

2
1961

人民中國報道

Brilas la Amikeco inter Ĉinio kaj Birmo!

Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj vizitis la Union de Birmo de la 2-a ĝis la 9-a de januaro.

1. Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj kaj Ĉefministro U Nu subskribas sur la Traktaton de Ekonomia kaj Teknika Kunlaborado inter la Ĉina kaj Birma Registaroj.
2. Ĉefministro U Nu vizitas la Ĉinan Industrian kaj Agrikulturan Ekspozicion.
3. De maldekstre: Generalo Ne Ŭin, Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj, Ĉefministro U Nu, Vicĉefministro Ĉen Ji ĉe la ŝtata festeno.
4. Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj en akompanado de Ĉefministro U Nu eliras el Rangun-aerodromo.
5. Ĉefministro U Nu gratulas al la ĉinaj artistoj post la unua prezentado en Rangun:
6. Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj alvenas Mandalaj.

Fotoj de Hinhua



Ŝoseo de Oro kaj Arĝento

—Korespondo el Birmo—

LA birmanoj ŝatas figuri la amikan interrilaton inter la du parencaj najbaroj Ĉinio kaj Birmo per “ŝoseo de oro kaj arĝento”. Sur tiu ĉi ŝoseo interfluas ja io pli altvalora ol pura oro, nome la sinceraj amikeco kaj kunlaboro inter la popoloj de Ĉinio kaj Birmo.

En fora antikveco, la praavoj de la ĉina kaj birma popoloj jam konstruis tiun ĉi ŝoseon de oro kaj arĝento, kaj kondukis tra ĝi viglan interŝanĝon ekonomian kaj kulturan. De tre tre longe la birmanoj intime nomas ĉinojn “baŭpo” aŭ “ŝujmiu”. “Baŭpo” signifas fratojn de la samaj gepatroj kaj “ŝujmiu”, orsimilajn parencojn. Sed tiu ĉi parence amika rilato estis malhelpata de la invado kaj subpremado de la imperiismo dum pasintaj pli ol cent jaroj. La imperiismo precipe subŝovis inter Ĉinio kaj Birmo semon de malpaciĝo—t.e. landlimon nedefinitan kaj disputojn kaŭ-

zantan. Sed la imperiismo ja neniel povas direkti la landojn kaj popolojn, kiuj jam estras sian propran sorton. Post kiam Ĉinio kaj Birmo gajnis sian veran sendependecon, la ĉefministroj de ambaŭ landoj iniciatis kune la famajn Kvin Principojn de Paca Kunekzistado, kaj surbaze de ili fine solvis unufoje por ĉiam la landliman problemon inter Ĉinio kaj Birmo. Dank’ al tio fortike starigis la domego de amikeco inter Ĉinio kaj Birmo, kaj tio garantias, ke de nun la ŝoseo de oro kaj arĝento inter ambaŭ landoj ĉiam funkcios por plena trafikado tute sen obstaklo.

Tra tiu ĉi ŝoseo, la registaroj kaj popoloj de Ĉinio kaj Birmo faris en la lastaj monatoj grandskalajn intervizitojn maloftegajn en la historio de internaciaj rilatoj. Ili jam tiel plilarĝigis la ŝoseon de oro kaj arĝento inter la du landoj, ke ĝia larĝeco jam tre tre multe superis tiun de iu ajn historia periodo.

Kiam Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj atingis Rangunon antaŭvespere de la Festo de Sendependeco de la Unio de Birmo, cent miloj da popolanoj de tiu urbo kolektiĝis ĉirkaŭ la aerodromo kaj ambaŭflanke de la stratoj por lin bonvenigi svingante naciajn flagojn de Ĉinio kaj Birmo. Tondraj ĝojkrioj “Vivu la amikeco inter Ĉinio kaj Birmo!”, “Vivu la Kvin Principoj!” erupciigis el la ondeganta homoceano. Entuziasmaj popolanoj de Birmo superŝutis Ĉefministron Ĝoŭ per petaloj de Ioniceraj floroj simbolantaj benon kaj feliĉon. Inter tiuj bonvenigantaj popolanoj sin trovis reprezentantoj de ĉiuj nacioj el la pli ol 60 regionoj de Birmo. Iu reprezentanto el Kaĉin-ŝtato diris, ke estas por li la plej granda feliĉo en la tuta vivo, ke li povas ĝoje celebradi la brilan Feston de Sendependeco de Birmo kune kun la ĉinaj amikoj.

La honoraj ĉinaj gastoj kun Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj ĉe la kapo ĉiam baniĝis en varma amikeco sur la birma tero. En ĝia ĉefurbo Ranguno, en la havena urbo Modamian, en la fama historia urbo Pokhan, ĉie ili renkontis milojn kaj milojn da ĝojplenaj vizaĝoj, kaj milojn kaj milojn da emociiĝintaj koroj vivukriantaj pri la nova disvolvigo de la amikeco inter ĉina kaj birma popoloj. Kun tia entuziasmo la birma popolo pavimas plu al la ŝoseo de oro kaj arĝento inter Ĉinio kaj Birmo per oraj kaj arĝentaj brikoj de amikeco!

Tra tiu ĉi ŝoseo de oro kaj arĝento, la registaroj kaj popoloj de Ĉinio kaj Birmo estas klopodantaj pliriĉigi la enhavon de la domego de amikeco inter Ĉinio kaj Birmo, ke ĝi fariĝu ankoraŭ pli brila kaj pompa,

EL POPOLA ĈINIO

Dumonata Gazeto

Eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo

Redakcio: P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Administracio: P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Enhavo de N-ro 2 (67) 1961

Bildo sur la kovrilo — Pupoj

Ŝoseo de Oro kaj Arĝento

Fabriko Kiu Helpas la Agrikulturon

Rememoro pri Intervjuo kun Prezidanto Maŭ

Zedong pri Papertigro

Unu Tago ĉe la Produktbrigado

Okulo de He Ŝanhua

Tra la Mallumo antaŭ la Tagiĝo

Ha, Teratestilo!

Unu Taso da Bakita Faruno

Ĉevalkapa Liuto

Venku Apartenas al la Revolucia Kuba Popolo!

Ekspozicio de Laborista Arto

Pri “Ĉina Antologio 1949-1959”

kaj klopodas fari novajn kontribuojn al la paco de Azio kaj de la tuta mondo.

Sro U Ba So, ministro de la Kultura Ministerio de Birmo, diris per poezia lingvo ĉe la inaŭgura ceremonio de la prezentado de la Ĉina Delegitaro Kultur-arta: "En la domago de amikeco inter Birmo kaj Ĉinio, nun ŝvebas ĉarmaj kantoj de la artistoj de ambaŭ landoj." La prezentado de ĉinaj artistoj magnete faris sensacion en tuta Ranguno. Loĝantoj de la ĉirkaŭaĵo de tiu urbo alsvarmis el ĉiuj direktoj por ĉeesti la spektaklojn. La prezentado de la kantoj "Amikeco inter Ĉinio kaj Birmo", "Kanto de la Festo de Sendependeco", "Ŝuj Mi" k. a. en birma lingvo tiel kortuŝis la spektantojn, ke ili ne povis sin deteni de aplaŭdado eĉ dum la prezentado. Kaj multe da brave-krioj kaj laŭdoj rikoltis ĉie en Ranguno ankaŭ la majstra prezenado de dancoj de la ĉinaj lernantoj sub la atentema instruado kaj direktado de la fama birma dancartisto Do Kin Njong.

Ĉiuj prezentoj de la Semajno de la Ĉina Filmo aranĝitaj de la Birma Registaro estis homplene ĉeestitaj. Birmaj amikoj multe prilauĉdis ĉinajn filmojn. "La unua impresio," diris al mi iu ĵurnalisto-amiko, "kiun ĉinaj filmoj donis al mi, estas ke la ĉina popolo amegas pacon. Por la prospero de sia lando, nun ĉiuj ĉinoj estas diligente laborantaj sur sia posteno, kaj nenia signo de 'militemo' estas trovebla ĉe ili." "La ĉinaj filmoj," diris iu laboranto el kulturarta rondo, "gajnis la koron de la spektatoro per siaj altnivela arto kaj riĉa enhavo de nuntempa vivo, dum filmoj de la okcidentaj landoj venenas la rigardantaron per nudaj femuroj kaj senhontegaj voluptaj scenoj."

Pompe disfloras ne nur la kultura kaj arta interfluado, sed novan disvolviĝon akiris ankaŭ tiu de ekonomio kaj tekniko inter Ĉinio kaj Birmo. La Traktato de Ekonomia kaj Teknika Kunlaborado inter Ĉina

La vizitantojn interesas la rizid-plantiloj ĉe la Ĉina Industria kaj Agrikultura Ekspozicio en Ranguno.

Foto de Hinhua



La amasoj de Mandalaj entuziasme bonvenigas Ĉefministron Ĝou Enlaj.

Foto de Hinhua

kaj Birma Registaroj estas nova kristaliĝo de la disvolviĝo de amika kunlaborado surbaze de egaleco kaj reciproka utilo, kaj tiu ĉi traktato ricevis entuziasman laŭdon de la birmaj amikoj. La publiko opinias, ke la ekonomia kunlabora rilato de sincera amikeco inter Ĉinio kaj Birmo estas esence diferenca de la malegala ekonomia rilato de prirabado kaj sklavigado fare de la imperiismo al eksterlando. La birmajn amikojn ege interesas la ĉinaj spertoj en ekonomia konstruado. La Ĉina Industria kaj Agrikultura Ekspozicio en Ranguno estis tre bonvena ĉe la birma popolo, kaj ĉiutage ĝin vizitis kelkaj dekmiloj da personoj. Ili interesiĝis precipe pri la ekspoziciaĵoj pri agrikulturiloj kaj akvomastromaj konstruoj, ĉar ankaŭ Birmo, kies plejmulton de la loĝantaro konsistigas terkulturistoj, alfrontas tiujn solvendajn problemojn. La vizitantoj alte taksis la grandegajn sukcesojn akiritajn de la ĉina popolo sub la gvidado de la tri ruĝaj standardoj de la ĝenerala linio, la granda antaŭensalto kaj la popola komunumo. Iu vizitanto nomata Go Go Kin skribis en la opinio-libro: "Ni, azianoj, sentas honoron kaj fieron, ke ni havas inter ni la potencon kaj flugrapide disvolviĝantan landon, Ĉinion." "Hodiaŭ," li skribis plue, "la grandaj sukcesoj atingitaj de la popola Ĉinio en ekonomio starigis brilan ekzemplon por niaj aziaj kaj afrikaj landoj. Ili kreskigas ambicion de la orientanoj kaj reduktas prestiĝon de la imperiismo!"

Ĉefministro Ĝou Enlaj jam finis sian viziton en Birmo kaj revenis al la patrolando kunportante kun si profundan amikecon de la birma popolo. Baldaŭ ankaŭ la birmaj Ĉefministro U Nu kaj aliaj ŝtatuloj vizitos Ĉinion kaj tie pasigos siajn feriojn. Sekve de tio, ke sur la granda ŝoseo de oro kaj arĝento, la gvidantoj kaj popoloj de ambaŭ landoj frekventas sin reciproke kaj pli disvolviĝas la ekonomia kaj kultura interfluado, la domago de amikeco inter Ĉinio kaj Birmo nepre fariĝos pli fortika kaj pli bela. La ĉina kaj birma popoloj estis, estas kaj nepre daŭre estos bonaj amikoj de generacio al generacio!

Fabriko Kiu Helpas la Agrikulturon

ANKORAŬ longe antaŭ la disvolviĝo de la nuna movado subteni agrikulturon tra la tuta lando, la Dizelfabriko de Vuhi jam komencis tion fari. Sintrovante en la samnoma urbo en Giangsu-provinco ĉe malsupra Jangzi-rivero, tiu ĉi fabriko produktas motorojn ĉefe por irigaciado en la kamparo. Malfrue en 1959 ĉe landa konferenco de labormodeloj, ĝi estis honorigata per ruĝa flago pro ĝia helpado al agrikulturo. Ĝi duobligis sian produkton super la antaŭa jaro — fabrikinte sufiĉe multajn motorojn por irigacii pli ol 236,600 hektarojn da tero — kaj starigis maŝinriparan servon kaj kurson por trejni manipulantojn de dizeloj. En 1960, ĝi defiis la fabrikojn de irigaciaj kaj drenaj ekipaĵoj tra la tuta lando por garantii maŝinliveradon en ĝustatempe por la terkulturaj sezonoj en diversaj lokoj.

Ĉiu klopodo por ĝustatempeco estas devizo de tiu dizelfabriko. Ĝia vicdirektoro, Ĝaŭ Ĝengda, registris en sia poŝlibreto la terkulturajn sezonojn en diversaj partoj de la lando por sin gvidi en traktado de la mendoj sur la produkta tabelo.

Dum 1959, la fabriko lanĉis tri konkursojn kun la sezonoj. Antaŭ la riztransplantado en 1959, ĝi produktis duoble tiel multe da motoroj kiel en la lasta kvarono de 1958, kaj ilin liveris ĝustatempe. Poste, en la somero kaj frua aŭtuno, kiam la vilaĝoj de Giangsu-provinco estis en arda batalo kontraŭ trosekeco, ĝi donis sian helpon per rapidaj produktoj kaj riparo de granda nombro da motoroj. La tria batalo estis kondukita en la vintro, kiam la laboristoj decidis elfari motorojn bezonatajn por la sekvanta printempo tri monatojn plifruo. Kvankam la fabriko havis nek la laborfortojn nek la ekipaĵojn necesajn por plenumi tiel grandajn mendojn en rapido, la laboristoj tamen akceptis la taskon kun avido. Ili lanĉis “milminutan kampanjon”, kies celo estis fini la laboron de mil minutoj en la 480 minutoj de ĉiu 8-hora labortago.

Unu el la viroj, kiuj ludis gravan rolon en ĝi, estis Ĝoŭ Akang, maljuna tornisto, kiu estis malriĉa


kamparano antaŭ la Liberiĝo. Por procedi cilindrojn, li faris ses gravajn plibonigojn de instrumentoj kaj labormetodoj. Instigate de lia ekzemplo, ĉiuj laboristoj en lia grupo superplenumis siajn fiksitajn laborkvantojn. Dum la verva kampanjo, sepono de la laboristaro de la fabriko atingis la normon de “milminuta produktovaloro” en ĉiu labortago kaj la tuta fabriko plenumis sian jaran produktoplanon 46 tagojn antaŭ la fiksitaj datumoj.

Ĝenoj Estas Bonvenaj

Alia maniero por servi agrikulturon fare de la Dizelfabriko de Vuhi estas plibonigado de siaj projektoj laŭ la bezonoj en agrikulturo. Por tio, la laboristoj havas sonorajn sloganojn: “Ni preferas mem havi mil ĝenojn, ol iomete maloportuni la terkulturistojn.” En aŭgusto, 1959, la fabrika servosekcio ricevis leterojn de kelkaj dizelmanipulistoj en kamparaj popolkomunumoj, kiuj diris, ke la ĉefa oletubo ne tre bone eltenas skuadon. Lu Ĝiming, estro de la

Enkonduko de flulinia munt-metodo altigis 9-oble la laborefikon.

Foto de Hinhua




dirita sekcio, projektis kun kelkaj spertaj laboristoj, novan kaj pli bonan tubon kaj proponis, ke ĝi anstataŭ tiun de ĉiuj tiam uzataj motoroj. Sed kelkaj el la teknikistoj kontraŭis al ĝi. Ili diris, ke kvin laborhoroj estas bezonataj por fari la novtipan tubon anstataŭ la tiamaj du. La plejmulto de la laboristoj ne konsentis. Kiel kelkaj diris, "Kvankam ni uzos pli multe da laborhoroj, tamen multe da tempo kaj ĝenoj estos ŝparitaj por la terkulturistoj. Por kio ni farus teknikajn renovigojn, se ne por servi al agrikulturo?"

La administracio de la fabriko subtenis la proponon kaj produktigis la novtipan tubon. Kaj la tempaldonon por produkto la laboristoj baldaŭ kompensis per teknikaj plibonigoj en la procedado.

En aliaj leteroj, terkulturistoj skribis, ke la dizelo kvankam havas grandan forton, tamen ne estas tiel facile manipulebla kiel bovo, kaj ili deziris pli simple funkciigeblan. Kelkaj volis, ke ĝi konsumu malpli multe da brulaĵo kaj estu adaptebla al pli multaj uzoj. En oktobro de 1959, la administracio de la fabriko mobilizis la laboristojn elpensi novajn ideojn por plibonigi la motoron. Ili komencis kampanjon por solvi la malfacilajn problemojn, kiu rezultiĝis en 500 raciigaj proponoj por la motoro de tipo 3110. Ĝis tiam, tiu ĉi 45-ĉevalpova tipo, unu el la plej vaste uzitaj en agrikulturo, povis daŭre funkcii 1,000 horojn sen ĝenerala esplorrifaro. Plibonigoj faris ĝin kapabla daŭre funkcii 2,000 horojn, reduktis ĝian pezon de 900 ĝis 670 kg. kaj malpliigis ĝian koston. Pligrandigita pelrado faris ĝin pli facile ekfunkciigebla, kaj aliaj ŝanĝoj reduktis ĝian hejtajkonsumon.

Dizeloj tuj transportotaj al kamparo

Foto de Hinhua



Dizelo estas ankoraŭ novaĵo en la vilaĝoj, kaj je multaj okazoj, la terkulturistoj ne povas ĝin funkciigi plene, ĉar ili ne bone konas la manipuladojn. Malsperta motormanipulanto, ekzemple, eble funkciigus 45-ĉevalpovan motoron por 1,500 turniĝoj pominute, je nur 1,000 turniĝoj pominute, aŭ je 30-ĉevalpova nivelo. Por ŝanĝi tiun ĉi situacion, la Kompartia Komitato de la Dizelfabriko de Vuhi alvokis siajn laboristojn helpi trejni la terkulturistojn. Kelkaj kontraŭis al tio, sentante ke ili jam estas tre okupataj por plenumi siajn produktajn taskojn. Sed Liu Hjuetian, la sekretario de la partia komitato klarigis, "Se ni ne instruos la kamparanojn, ne multe utilos kiom ajn multe da motoroj ni produktos." Sekve la laboristoj prenis sur sin la respondecon pri tio.

Dum la jaroj 1958 kaj 1959, per invitado de homoj el la kamparo por mallonga trejnado en la fabriko, kaj per sendo de laboristoj al la vilaĝoj, la fabriko trejnis 2,550 manipulistojn de dizelo. La laboristoj veturis tiel malproksimen kiel Hejlonggiang-provincon en la nordo aŭ Hajnan-insulon en la sudo, ĉien kie oni aĉetis la motorojn grandnombre. En la somero de 1959, grupo de trejnantoj iris al la Aŭtonoma Regiono de Interna Mogolio kaj la Huj-a Aŭtonoma Regiono de Ninghia, kaj en 1960, al la Ĝuang-a Aŭtonoma Regiono de Guanghi en la sudo. Speciale laŭditaj de la terkulturistaj uzantoj estis du malnovaj laboristoj, Vang Degen kaj Huang Ĉangmaŭ, kaj teknikisto Vang Ĝenhan, kiuj formis la unuan grupon. Tiel multe da junuloj de mongola kaj huj-a nacimallimultoj venis lerni en la diversaj lokoj, ke la trejnantoj devis ilin instrui laŭvice ĝis malfrua nokto. En iom pli ol monato, ili donis al la junuloj, kiuj

havis tre malmulte da sperto pri maŝinoj, plenan fundamenton en la bazaj principoj de la motoro, ĝiaj manipulado, muntado, riparo kaj purigo. Kiam la tri laboristoj estis forlasantaj iun lokon, iu terkulturisto venis por ilin danki, dirante, "Ni povas aĉeti maŝinojn, sed ni neniam povas aĉeti amikecon kiel la via."

Ripara Servo

La servosekcio starigita de la Dizelfabriko de Vuhi ne nur traktas motorojn resenditajn al la fabriko sed ankaŭ elsendas migrantajn servogrupojn en multokupajn sezonojn por kontroli kaj ripari uzatajn motorojn. Iun tagon en aŭgusto, 1959, kiam la vilaĝoj en Giangsu-provinco estis



Laboristo de la Dizel-fabriko de Vuhi instruas al junaj manipulistoj el kamparo.
Foto de Hinhua

batalantaj kontraŭ trosekeco, la fabriko ricevis urĝan komunikajon de Ĝanglu-a Popolkomunumo en Liuhegubernio de tiu provinco. Ĝia pumpmaŝino malfunkciĝis kaj 1,500 muoj da rizkampoj estis en danĝero de sekiĝo.

Tiumomente, nur Huang Manlin, laboristo maljuna, estis deĵoranta en la servosekcio. Li tuj rapidis preni trajnon kaj atingis la komunumon la sekvintan tagon. La manipulisto, iu junulo, renkontis lin kun okuloj sangruĝaj pro manko de dormo, kaj la maŝino estis kovrita de fulgo.

Ekzameninte la maŝinon, Huang trovis, ke nur unu el la tri cilindroj funkcias, ĉar la bekoj oleŝprucigaj de la aliaj du estis en mizera stato. Alporti novajn oleŝprucigajn bekojn de la fabriko signifus perdon de du tagoj, sed li sentis, ke li ne povas ilin ripari tie sen la speciala frota kombinaĵo tie nehavebla. Post streĉa cerbumado, li trafis ideon. Se vi povas akrigi tranĉilon sur briko, li pensis, kial vi ne povas froti maŝinparton per ĝi. Li trovis brikon, pulvorigis parteton de ĝi por tion uzi kiel frotan kombinaĵon, sidigis ĉe la kampego kaj riparigis la difektitajn maŝinpartojn. La suno jam estis subiranta, kiam li finriparis la motoron kaj arĝenta akvokolono elŝpruciĝis el la pumpilo.

Post nelonge, Huang Manlin ricevis leteron de la komunumaj membroj. "Ni estas vere tre dankemaj por la helpo de niaj laboristaj fratoj," ĝi diris. "La

maŝino pumpis akvon konstante tri tagojn kaj tri noktojn, kaj ni sukcesis elsavi pli ol 1,000 muojn da rizkampoj. Ni atendas bonan rikolton."

En 1960, post kiam la Komunista Partio alvokis al la tuta lando por forte subteni agrikulturon, la laboristoj de la Dizelfabriko de Vuhi faris ankoraŭ pli grandajn klopodojn. De januaro ĝis septembro ili produktis 3,481 motorojn kun totalo de 180,000 ĉevalfotoj—pli ol 80 procentojn pli multe ol en la sama periodo de la antaŭa jaro. Ĉiuj produktaj estis pretaj tri monatojn antaŭ la tempo, kiam la terkulturistoj ilin bezonis. Ili ankaŭ riparigis 1,700 motorojn por la popolkomunumoj, trejnigis 1,300 manipulistojn de dizelo kaj projektis specialan tipon de dizelo taŭgan por la altebeno de Tibeto. Tiu ĉi tipo estas komparefacile ekfunkciigebla, muntebla kaj transportebla.

Kuraĝigate de la slogano "Subtenu la vilaĝojn tutkore! Faru renovigojn milvoje!"

la laboristoj sinjetis en kampanjon por plua teknika revolucio. Je la komenco 64.8 procentoj de la laboroj jam estis mekanikigita aŭ duonmekanikigita; en oktobro la cifero jam altiĝis 83.4 procentoj. Sekeve la laboristoj ne nur povis plenumi la ĉiumonatan labortaskon plifruge, sed ankaŭ helpi iun komunuman terkulturilan fabrikon en la antaŭurbo de Vuhi. La dizelfabriko donis al la komunuma fabriko elektrajn motorojn, tornilojn kaj kelkajn el siaj aliaj ekipaĵoj, kaj sendis kelkajn el siaj plej bonaj laboristoj por ĝin helpi tie. Nun unu el ili enloĝiĝis en la popolkomunumo kaj fariĝis direktoro de ĝia fabriko.



Rememoro pri Intervjuo kun Prezidanto Maŭ Zedong pri Papertigro

LA aserto de Prezidanto Maŭ Zedong, ke imperiismo kaj ĉiuj reakciuloj estas papertigroj, dirita al mi antaŭ dek kvar jaroj en Jan-an, estas nun kaj famekonata kaj historia. Ĝi lumigis la vojon de la mondaj eventoj dum tiuj ĉi dek kvar jaroj. Estas tial interese rememori iujn el la detaloj de la kondiĉoj, sub kiuj tiu ĉi aserto estis elmetita.

Kiam mi iris al Jan-an en somero de 1946, la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la Dua Mondmilito, kies parto ĝi estis, finiĝis antaŭ ĝuste unu jaro. La plejmulto de usonanoj ankoraŭ rigardis U.S.S.R. kaj Ĉinion kiel aliancanojn, sed reakciaj elementoj jam komencis la "malvarman militon", kaj eĉ estis minacantaj fari ĝin varma milito. Ilia malamikeco kontraŭ U.S.S.R. ne ĉesis por momento, eĉ dum la milito kontraŭ Hitler, en kiu Usono kaj U.S.S.R. estis aliancanoj. Ili montris tiun ĉi senmortan malamikecon multmaniere, precipe per la aserto, ke Hitler estas la "malĝusta malamiko", kaj ke post lia frakaso, U.S.S.R. ankoraŭ devos esti kontraŭbatalata. Do, kiam la mondmilito finiĝis kaj Usono portempe monopolis A-bombon, komenciĝis publika propagando por uzi tiun ĉi potencon devigi Sovetunion akcepti ĉiajn ajn usonajn postulojn.


En Ĉinio kondiĉo de formala armistiko daŭris inter Ĉiang Kajŝek kaj la fortoj gvidataj de la komunistoj, sed ĝi estis ofte detruita de Ĉiang, kies armitaj atakoj kontraŭ la komunistoj daŭris eĉ dum la Kontraŭjapana Rezistmilito. La oficiala pozicio de Usono estis, ke Ĉinio devis esti unuigita sub Ĉiang, kaj ke la komunistoj devis forlasi siajn proprajn armeojn, kaj esti leĝigitaj kiel malplimultnombra partio. Armistiko estis subskribita, kiu estis konata kiel Marshall-a Armistiko, ĉar ankaŭ Generalo George C. Marshall subskribis ĝin, kaj stariĝis en Pekino "Plenuma Stabo", partoprenata de Ĉiang kaj la ĉinaj komunistoj sub usona prezidanteco. Ĝia celo laŭdire estis pacigi armitajn konfliktojn okazintajn. Por tiu ĉi celo "armisticaj grupoj" estis starigitaj en preskaŭ kvardek urboj de norda kaj nordorienta Ĉinio, interligataj kun la Plenuma Stabo per usonaj militaj aeroplanoj.

La celo de Vaŝingtono en ĉio ĉi tio estis akiri regadon super la tuta Ĉinio per traktatoj kun Ĉiang Kajŝek. Ili profitis la armisticon por transporti solda-

tojn per ŝipoj kaj aeroplanoj en nordan kaj nordorientan Ĉinion, al la lokoj de kie ili povis plej facile ataki la liberigitajn regionojn en la nordo. Ilia interligado per aeroplanoj kun kvardek ĉinaj urboj ne estis kontrolata de ia ajn ĉina inspekto; ili povis fotografi el siaj aeroplanoj tutan Ĉinion tiel malproksimen kiel Ĉicihar. La celo de la usonaj reakciuloj estis ne nur gajni disponon de ĉina riĉaĵo, kiun ili esperis ekspluati por sin riĉigi aliajn kvindek jarojn. Ili ankaŭ, kiel malkaŝis Generalo Wedemeyer, esperis havi militbazojn en la Nordoriento kaj en Sinkiang kontraŭ U.S.S.R.; ili ankaŭ esperis uzi milionojn da ĉinaj soldatoj kiel kanon-furaĝon en la estonta kontraŭ-sovetunia milito.

Dume, en la komenco de 1946, armistiko oficiale ekzistis kaj aeroplanoj de la Plenuma Stabo estis disponeblaj al la uzado de ĵurnalaj korespondantoj. Tial, mi povis flugi de San Francisco al Ŝanhajo kaj de tie al Pekino, kaj de Pekino al diversaj liberigitaj regionoj de la nordo, plejmulte el kiuj ne estis vizititaj de iu ajn eksterulo. Tiu ĉi oportuno klare ne povis longdaŭri. Ĉiang lanĉis militon kontraŭ la Centraebeneja Liberigita Regiono, kaj okupis ĝian ĉefurbon mezsomere de 1946. Intertraktado ankoraŭ daŭris pri aliaj liberigitaj regionoj, kaj Generalo Marshall ankoraŭ pretendis pri la intenco solvi la demandojn pace. Tiel longe kiel tiu ĉi formalajo daŭris, estis eble flugi ĉiusemajne de Pekino al Jan-an aŭ al iu ajn alia liberigita regiono. Tiuj ĉi oportunaj estis disponeblaj eĉ al verkistoj de la laboristaj gazetoj.

Mi do flugis al Jan-an malfrue en somero de 1946 kaj loĝis tie por kelkaj semajnoj, kaj poste revenis al Pekino, de kie mi vizitis tri aliajn liberigitajn regionojn, restante po unu semajno en Kalgan, la ĉefurbo de Ŝanhi-Ĉahar-Hobej-a Lim-regiono, kaj en Tajhang-montaro, kie Liu Boĉeng havis stabejon en unu granda liberigita regiono, enhavanta partojn de kvar provincoj, kaj poste en Harbin kaj Ĉicihar, kie floris potenca Nordorienta Liberigita Regiono, defendata de la trupoj de Lin Biaŭ. Vizitinte tiujn ĉi regionojn, mi revenis al Jan-an en oktobro kaj tie restis dum la vintro de 1946-47 ĝis Jan-an estis evakuita en marto de 1947.



La hodiaŭa Jang-familia Vilaĝo de Jan-an

Foto de Hinhua

EN Jan-an, dum mia vizito, ĉiuj agadoj kometitaj antaŭ jardeko ankoraŭ daŭris. Jan-an estis sidejo de la Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio kaj la loĝejo de Prezidanto Maŭ kaj Ĝu De kaj multaj aliaj membroj de la Centra Komitato. Ĝi ankaŭ estis la ĉefurbo de la Ŝenhi-Gansu-Ninghia-a Lim-regiono, kaj kultura centro, kie funkciis la Jan-an-a Universitato kaj iu Internacia Paco-hospitalo tiel nomata pro la kanada kirurgo Bethune. En Jan-an eldoniĝis la ĉiutaga ĵurnalo "Liberigo" kaj funkciis Centra Radio-stacio kaj troviĝis teatro, kie bonaj pekinaj operoj, klasikaj kaj modernaj, ambaŭ estis ludataj. Kaj ili ĉiuj funkciis sub tre primitivaj kondiĉoj. La sola elektra lumo venis de la dinamo ĉe la Usona Milita Interkontakta Grupo, kiu stariĝis dum la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj ankoraŭ ne estis fermita; tio servis nur al la usonanoj kaj malmultaj aliaj proksimaj loĝejoj. Plejparto de la loĝantaro, inkluzive la membrojn de la Centra Komitato, uzis petrolon aŭ kandelojn por lumigo. Jan-an estis sub milita minaco de Hu Zongnan, generalo de Ĉiang en Si-an. Dum mia restado, aeroplanoj de Hu ofte flugis super la regiono por observado kaj kelkfoje faligis malgrandajn bombojn, sed tiuj ĉi atakoj estis, en la komenco, ne gravaj.

Kiel primitiva la transporto estis montriĝas en la fakto ke mia unua intervjuo kun Prezidanto Maŭ devis esti prokrastita pro pluvo en la supraj valoj, kiu ŝveligis Jan-riveron. Tiu ĉi rivero ordinare estas nur flueto, tiel malprofunda ke knaboj povis facile ĝin transvadi plaŭdante, sed subita pluvo povis estigi

torenton profundan kaj sufiĉe fortan por renversi ŝarĝaŭton. Ĉar Prezidanto Maŭ loĝis sur la transa bordo de la rivero de kie mi loĝis kaj ne ekzistis ponto taŭga por aŭtoj, mi devis atendi ĝis la sekvinta tago. Tiam, mi veturis al la hejmo de Maŭ per ŝarĝaŭto kiu saltadis sur la rondŝtonoj en la rivero kaj suprengrimpis la transan bordon kun multaj gruntoj de la motoro, kaj eniris pordegon de Jang-familia Vilaĝo, la ravino kie sin trovis la sidejo de la Centra Komitato. Iom antaŭe, la ŝarĝaŭto haltis apud kruta montvojeteto. Ni grimpis inter maizotigoj kaj tomato-vitoj, ĝis unu larĝa argila teraso, de kie longa vico de kavernoj malfermiĝis en la krutan montflankon. Kvar el ili estis la hejmo de Prezidanto Maŭ.


Ni sidis sur la ebena argila teraso sub pomarbo, vide al malproksimaj montetoj dum la posttagmezaj horoj ĝis sunsubiro. La bela nigrhara edzino de Maŭ sidis apud ni por momento kaj poste iris en kaverton por prepari manĝaĵon. Ilia filineto, en katunaj vestoj kun helkoloraj desegnoj, ludis ĉe la genuoj de sia patro, grimpis sur liajn genuojn, ricevis lian kareson kaj poste ŝi venis kaj donis ŝian manon al la vizitanto. Je la komenco de la interparolo mi rimarkis movadon inter la herboj sur la monteto ĉirkaŭ dudek metrojn super la supro de la kaverno de Prezidanto Maŭ. Ĉar aeroplanoj de Hu Zongnan antaŭ kelka tempo faligis malgrandan bombon proksime de la kaverno kie Prezidanto Maŭ loĝis, mi miris ĉu iu gardstaranto postenis por gardi la hejmon de la Prezidanto. Tial mi demandis: "Kiu estas tie supre?"

"Nur alia familio," respondis Maŭ. "Iliaj infanoj estas scivolemaj pri mia fremda gasto." Tiel mi lernis unu lecionon pri la relativeco de homa scivolemo. Estis mi mem, kiun la popolo sur la monteto estis observanta. Prezidanto Maŭ estis al ili najbaro, kun kiu ili kune kulturis la legomĝardenon sur la monteto.

Malofte mi vidis homon, kiu tiel bone adaptiĝis al sia ĉirkaŭaĵo. Li verŝajne ne postulis izolecon, kion iuj intelektuloj pensas necesa por sia laboro. Kian privatecon li bezonis, tian donis liaj najbaroj pro la respekto kiun ili havis al li. La infanoj kaŝrigardis de supre, sed faris nenian bruon. Lia filineto, petante lian kareson, faris nenian provon deturni lian atenton de nia interparolo.

Li portis la ordinarajn vestojn el malhele blua katuno, sed ili estis pli netaj kaj pli bone prizorgitaj ol tiuj de aliuloj. En lia maniero ne estis urĝeco aŭ maltrankvileco, sed ekvilibra amikeco. Liaj diroj estis plenaj de figuroj kaj lia vizaĝo ofte brilis en viveca humoro kiam li ridetis, sed li havis okulojn de kiuj nenio povis eskapi.

LA konversacio iris facile. La interpretisto faris bonan laboron kaj la maniero de Prezidanto Maŭ estis tiel esprimplena ke mi ne konsciiis ian ajn lingvan baron. Lia menso facile trakuris la



La Tagoj por Imperiismo Ne Estos Multaj.

Skizo kolektive verkita de la Lusin-a Belarta Kolegio

mondon, ampleksante multajn landojn kaj epokojn. Unue, li demandis min pri Usono. Pri multaj usonaj eventoj li estis pli bone informita ol mi. Tio estis miriga, ĉar mi forlasis Usonon nur antaŭ kelkaj semajnoj, dum en la daŭro de dudek jaroj Maŭ eĉ ne havis poŝtan rilaton kun la ekstera mondo. Sed li planis la akiron de scio tiel zorge kiel militan strategion. La Radio-centro en Jan-an registradis la mondajn novaj-servojn kaj faris resumojn por la uzo de la Centra Komitato. La portempa interrilato kun Pekino, kiun la aeroplanoj de la Plenuma Stabo liveris, estis utiligata por enporti librojn kaj ĵurnalojn el multaj landoj. La scio pri mondaj eventoj de la Prezidanto estis tre kompleta.

Estis post kiam mi respondis kiel eble plej bone liajn demandojn pri Usono, ke mi levis la demandon pri la minaco de milito inter Usono kaj U.S.S.R., per kiu la intervjuo nun publikita en la 4-a volumo de la Elektitaj Verkoj de Maŭ komenciĝis. La Prezidanto diris ke la babilo pri milito estas nuntempe plejparte fumvualo, kiun la reakciuloj kreis por kovri la multajn kontraŭdirojn senpere frontantajn kontraŭ usona imperiismo. Usona monopola kapitalo kompreneble songis ruinigi U.S.S.R., sed la celo ne estis tiel rekta. Ili unue devis subpremi la kontraŭstaron de la usona popolo kontraŭ milito, kaj poste ili devis meti aliajn kapitalismajn landojn sub la regado de Usono. Iu ajn milito kontraŭ U.S.S.R. devis esti farata tra la teritorio de aliaj landoj, tra Britio, Francio kaj Ĉinio. Tial usonaj reakciuloj uzis ĉiujn ĉi tiujn babilojn pri batalo kontraŭ U.S.S.R. por doni ekskuzon por ataki la civilajn rajtojn kaj vivnivelon de la usona popolo, kaj por meti la aliajn kapitalismajn landojn sub la regadon de Usono. Li elmontris ke sub tiu ĉi preteksto, Usono estas stariganta militajn bazojn en

multaj lokoj kaj jam prenis tre grandan areon sub usonan regadon.

PREZIDANTO Maŭ ridante ilustris sian punkton per te-tasoj kaj malgrandaj blankaj vin-pokalaj sur la tablo, metante grandan tason por reprezentanti la usonan imperiismon kaj ĉirkaŭigante ĝin per malgrandaj vinpokaloj por reprezentanti la usonan popolon, per longa zigzaga linio el alumetujoj kaj cigaredoj por reprezentanti aliajn landojn, ĉiujn apartigantajn usonan imperiismon de Sovetunio, granda taso ĉe la alia flanko.

La kunlaboro de la popolo, li diris, estis sufiĉe forta se plene vekita, por preventi trian mondmiliton. Sed tiu ĉi kunlaboro kontraŭ mondmilito nepre devas esti vekita, alie la milito eble venus.

La manĝaĵo kiun Sinjorino Maŭ metis antaŭ ni estis simpla sed bongusta, plejparte farita el maturaj tomatoj, bulboj, faboj kaj piproj el la legomĝardeno sur la montdeklivo. Por deserto estis "oktrezora rizo", sed en tiu ĉi okazo la rizo estis spicita per kvar aĵoj: arakidoj, juglandoj, prunoj el la ĝardeno de la Prezidanto kaj jujuboj el Jujub-ĝardeno pli supre apud Jan-rivero kie Ĝu De loĝis.

"Tiu ĉi rizo ne estas kulturata en Jan-an-gubernio, sed ni kulturis ĝin en ĉi tiu Lim-regiono apud la Flava Rivero," klarigis Maŭ. Li aldonis: "Ni suduloj trovis la milian manĝon de la nordo malfacila kiam ni alvenis en Jan-an. Fine ni trovis lokon kie rizo povis esti kulturata."

Ni daŭrigis nian interparolon trinkante freŝan teon, dume Sinjorino Maŭ enlitigis la filineton en unu el la kavernoj. La rekta parolo, vasta amplekso de scio, akra analizo kaj poeta figurado de Maŭ faris lian konversacion la plej stimulantanta, kian mi iam

konis. Parolante pri usonaj armiloj kaptitaj el Ĉiang-aj trupoj, li nomis ilin “sango-transfluigo, el Usono al Ĉiang, el Ĉiang al ni”. . . . Parolante pri usona imperiismo li uzis multajn metaforojn. . . . Iufoje li diris: Ĝi estas la plej forta en historio kaj ankaŭ plej malforta en historio. La ĉieloskrapanto estas la plej alta, sed la fundamento estas la plej malfirma.” Aliffoje li diris: “Usona imperiismo fariĝas soleca; tiel multaj el ĝiaj amikoj mortis aŭ malsaniĝis. Eĉ penicilino ne ilin sanigos. Estas nur nun ke tiel multaj reakciuloj morte malsaniĝas.”

La metaforo de “papertigro” estis uzita dum tiu ĉi inter parolo kaj mi estis speciale impresita, ne nur de la metaforo sed ankaŭ de la maniero en kiu Prezidanto Maŭ, ne sciante anglan lingvon, povis korekti la precizan tradukon de liaj vortoj. Kiam li unuafoje diris, ke reakciaj regantoj estas papertigroj, la vorto estis tradukita per “scare-crow”. Prezidanto Maŭ haltis en sia parolo kaj petis min klarigi al li ja kio “scare crow” estas. Kiam mi respondis ke ĝi estas homo-figuro, kiun kamparanoj starigas en kampo por fortimigi korvojn, li tuj esprimis malkontentecon, kaj diris ke tio ĉi ne estas lia signifo. Papertigro, li diris, ne estas io senviva por timigi korvojn. Ĝi timigas infanojn. Ĝi ŝajnas esti terura tigro sed fakte, estante farita el presita papero, ĝi moliĝas malseketigite, kaj estas forlavigita en pluvego.

Post tio Prezidanto Maŭ uzis la vortojn “papertigro” en la angla lingvo, ridante je la sono de la anglaj vortoj en la frazo, la cetero de kiu estis en la ĉina lingvo. Antaŭ la Februara Revolucio en Rusio, li diris, la Caro ŝajnis tre forta kaj terura. Sed februara pluvo forlavis lin. Ankaŭ Hitler estis forlavis de la ŝtormoj de historio. Tiel estis la japanaj imperiistoj. Ili ĉiuj estis papertigroj. La samo okazos al ĉiuj imperiistoj kaj reakciuloj. Ilia forto kuŝas nur en la nekoscio de la popolo. La koscio de la popolo estas fundamenta demando. Ne estas eksplodaĵoj de atombomboj, sed la homo, kiu manipulas ilin. Li devas ankoraŭ esti edukata . . . Post momento, li aldonis: Komunistaj Partioj havas veran forton, ĉar ili vekas la koscion de la popolo.

Estis jam preskaŭ meznokte, kiam la Prezidanto kaj lia edzino akompanis min malsupren de la montdeklivo kun petrolo-lanterno por lumigi la vojon ĝis la atendanta ŝarĝaŭto. Ĝisrevidoj estis diritaj. Ili staris sur la monteto rigardante dum mia ŝarĝaŭto iris malsupren saltadante kaj plaŭdis en Jan-riveron. Brilaj, tre brilaj estis la steloj super la sovaĝaj kaj mallumaj montetoj de Jan-an.

La metaforo de papertigro, tiel enkondukita, estis uzita de Prezidanto Maŭ pli ol unu fojo dum mia restado en Jan-an. Ĉar mi restadis tra la vintraj monatoj, mi vidis la Prezidanton multfoje je diversaj okazoj, kia datrevena festeno aŭ prezentado de la pekina opero, kiun li ŝatis ĉeesti, aŭ la sabatnoktaj dancoj, kiuj kunvenigis la kadrojn el multaj partoj de Jan-an por socia kontakto ĉiusemajne.

U NU el la mallumaj tagoj en Jan-an estis la tago kiam venis la novaĵo ke Generalo Marshall jam donis “milit-superfluaĵon” kun laŭtaksa valoro de du bilionoj da dolaroj al Ĉiang Kajšek. Tio ĉi rompis ĉiujn ŝajnigojn ke Usono deziras eviti internan militon en Ĉinio; tio estis rekta kuraĝigo al Ĉiang daŭrigi atakon ĉiuf flankan. Prezidanto Maŭ mem donis al mi la novaĵon. Tiam li diris: “En la fino ni dependas de la soldatoj de Ĉiang. Ni perdas homojn, sed ni ankaŭ kaptas homojn kaj kelkaj venas al ni. Tiel ni plimultiĝas.”

Mi faris kelkajn stultajn rimarkojn pri la pacigo de la interna milito fare de Unuigitaj Nacioj, sed Maŭ skuis sian kapon kaj diris: “Ili ne estas dependeblaj. Nur la soldatoj de Ĉiang estas dependeblaj.” Kun ekrideto li aldonis: “La soldatoj de Ĉiang estas tre bonaj soldatoj. Ili bezonas nur malmulte da politika eduko. . .” La strategio de Maŭ estis fidplena, ĉar en la invadantaj armeoj li vidis la longe subpremitan kamparanaron de Ĉinio, kiu ne povis resti lia malamiko, sed kiun li nepre devas gajni. Estas mia impresado ke ankaŭ ĉifoje li denove parolis pri la papertigro, sed mi ne estas certa.

La Amikeco Similas al la Longa “Granda Muro”.

Novjara bildo de Liu Danĝaj



Tamen, mi havas tre klaran memoron pri mia lasta interparolo kun Prezidanto Maŭ en Jan-an, dum kiu la papertigro estis ree menciita. Estis frua marto de 1947 kaj Jan-an estis preskaŭ evakuita. Por tri monatoj la trupoj de Hu Zongnan estis atakantaj la limon de la Lim-regiono, de kiu Jan-an estis ĉefurbo. Tiutempe la plejmulto de la aktivadoj de Jan-an estis “disigitaj”, taktiko en kiu la komunistoj estis spertaj kaj kiun ili ofte uzis. La verkistoj, muzikistoj, kaj aliaj membroj de la Kultura Asocio iris organizi vintrajn kursojn kaj agraran reformon en diversaj lokoj. La studentoj de Jan-an-a Universitato iris en vilaĝoj, por aranĝi la evakuon de la kamparanoj laŭ la novaĵo el la fronto. Duono de la laborantaro de la tagjurnalo kaj radio-stacio foriris por starigi alian bazon. La ŝtata banko translokiĝis, kaj eĉ la grandaj fenestraj vitroplatoj de la banko estis deprenitaj kaj enterigitaj, por ke la malamiko ilin ne detruu, sed iutage ili estos reprenitaj kaj uzataj denove. Tiel same la grandaj lignaj tabloplatoj de la manĝoĉambro de la Centra Komitato estis enterigitaj, konservataj por estonta uzo. Virinoj kaj infanoj translokiĝis norden el la pli profundajn montetojn.

La fama Internacia Paco-hospitalo, nomata pro Bethune, ĵus celebris sian sepan datrevenon. Nun la malsanuloj kaj la patrinoj ĵus akuŝintaj estis portitaj en brankardoj malsupren el la naŭ altaj terasoj da kavernoj, sekvate de kuracistoj kaj flegistinoj. Beboj kuŝis en korboj interne kovritaj per ŝafofelo, pendantaj je la flankoj de azenoj, pretaj por sia vojaĝo en la vintran nokton. Magdalen Robitzer, la dentistino de UNRRA, ĉeĥino, kiu diris al mi pri “la ĥaoso en Ĉeĥoslovakio kiam Hitler enmarŝis,” miris nun je tio, kion ŝi nomis “la plej bonorda evakuo de iu ajn ĉefurbo.”

“Tutage mi laboris en la dentklinikon,” ŝi diris, “super la infanoj kies dentoj plej bezonis kuracadon. Je la sekvanta mateno nenio estis tie postlasita; ili translokiĝis nokte. En la vespero kiam ili pakadis, ili estis ridantaj kaj kantantaj. Mi parolis kun infano en infanĝardeno kies patrino foriris samnokte. Li estis ironta kun la infanĝardeno; mi demandis kial li ne foriris kun sia patrino. Li respondis: ‘Ŝi ne estas en mia grupo.’ Tian komprenon ĉe infanoj mi neniam vidis.” Ŝi aldonis: “Sed sin trovas kuracistoj, kiuj laboradis ĉi tie sep jarojn, unu ĥirurgo, unu okulisto, unu bakteriologo, gravaj specialistoj. Kaj ili nenion prenis escepte de la vestoj sur iliaj dorsoj kaj unu malgranda pakajo en naztuko kaj ekiris piede al la montetoj.”

FINE, dum unu semajno la usonaj aeroplanoj de Hu Zongnan alvenis observante, flugante malalte. La Centra Komitato jam malekipis la kavernojn kaj translokiĝis ĉirkaŭ dek kvin kilometrojn norden en la pli krutajn montetojn. Mi sciis ke mi devas baldaŭ foriri, per unu el la lastaj usonaj aeroplanoj. Je la nokto antaŭ la foriro de mia aeroplano,



*Prezidanto Maŭ kun Diversnaciaj Popolanoj
Novjara bildo de Jang Peng*

membroj de la Centra Komitato revenis al Jan-an vespere,—pro la aeroplanoj de la malamiko, vojaĝo dum tago jam ĉesis—por rigardi novan teatraĵon pri la agrara reformo, en la teatro kiu estis baldaŭ detruota. Ĝoŭ Enlaj sendis por mi kaj mi iris por la lasta fojo al la teatro sed mi memoras tute nenion pri la teatraĵo. Mi nur memoras, ke Prezidanto Maŭ kaj la aliaj gvidantoj sidis ĉe la fronta vico, kaj varmigis siajn manojn super fajrujoj de lignokarbo, ĉar la domo ne estis hejtata kaj estis tre malvarme.

Poste mi estis kondukita en unu el la malplenajn kavernojn—kaj unu estis nun tiel bona kiel alia—kun Prezidanto Maŭ, Ĝoŭ Enlaj kaj Lu Dingji. Junaj servosoldatoj alportis taburetojn kaj tablon kaj teon, melonsemojn kaj kandidajn arakidojn por adiaŭa regalo. Prezidanto Maŭ diris al mi ke mi devas tuj forlasi Jan-an-on nun per la aeroplano kiu estis forironta en la mateno, ĉar se mi restus plu mi trovus min mem izolita por longa tempo. Mi ne povis iri al la montetoj kien ili estis irontaj. Sed mi nun havis ĉiun informon pri Jan-an kaj la liberigitaj regionoj kaj la strategio per kio la Popola Liberiga Armeo estis venkonta Ĉiang Kajŝek-on. Mi devis porti tiun ĉi novaĵon al la mondo. “Do post kiam ni denove havos

kontakton kun la mondo, vi revenos.” Eble en ĉirkaŭ du jaroj, li pensis. Ĝi pruviĝis esti iom malpli.

Mi montris al li leteron kiu venis tiutage el Novjorko per la aeroplano, per kiu mi mem estis forironta je la sekvinta tago. Ĝi estis plena de streĉeco kaj ĉagreno. “La progresemaĵoj povas neniam ŝanĝi la usonan eksterlandan politikon”, skribis mia amiko. “Ili devas batali por savi eĉ siajn proprajn haŭtojn. Mi esperas ke la ĉinaj komunistoj havas nenian iluzion pri tio, kion la usona registaro povas fari.”

MAŬ Zedong ridetis. Ne, li ne havis iluziojn. Sed li pensis ke la usonaj progresemaĵoj tro alte taksis la potencon de la usonaj reakciuloj kaj tro malalte taksis la potencon de la demokrataj fortoj. Tio estas psikologia malforteco inter usonaj progresemaĵoj, li diris.

La usona reakciularo, li daŭrigis, havas pezan ŝarĝon. Ĝi devas subteni la reakciulojn de la tuta mondo. Kaj se ĝi ne povus subteni ilin, ilia domo falos. Ĝi estas domo kun unu kolono. Same kiel ĉiuj reakciuloj en historio, la usonaj reakciuloj pruviĝos esti nur papertigroj. Estas la usona popolo, kiu estas forta, kiu havas daŭran potencon

Meznokte la amikaj servosoldatoj alportis freŝan teon kaj novajn kandelojn al la kaverno, kiu al Maŭ Zedong estis nun nur ununokta haltejo dum la marŝo. Mi pensis pri mia amiko en Novjorko, en vaporvarmigata apartamento, ankoraŭ ne en danĝero de malliberigo, multe malpli de morto, kiu ĉagreniĝis pro la agadoj de la usonaj reakciuloj. Kaj mi pensis kiel Prezidanto Maŭ, kun sia Centra Komitato, estis ricevanta la plenan forton de kvar milionoj da armitoj de Ĉiang Kajŝek kun siaj novaj usonaj armiloj, kontraŭ kiuj la komunistoj eĉ ne havis kontraŭaeroplanajn pafilojn; kaj estis nun forlasantaj sian lastan ĉefurbon, kaj elirantaj en la vintran nokton de la montetoj en norda Ŝenhi, tiel fida en la forto de la ĉina popolo kaj en ilia propra analizo kiel liberigi kaj organizi tiun forton, ke ili facile parolis pri ilia probabla dato de reveno. Kaj mi sendis leteron de konsolo al la progresema amiko en Novjorko ke la usonaj reakciuloj ne devas esti tro multe timataj.

Mi observis la vizaĝon de Maŭ malstreĉa kaj fideplena, kiam li diskutis la estontecon de la mondo. Tio ĉi estis la bildo kiun mi havis enmense la sekvantan matenon sur aeroplano al Pekino, kaj en postaj jaroj tra la mondo.

La pasintaj dek kvar jaroj de Ĉinio kaj de la mondo pruvis la pravecon de la aserto pri papertigro, sed aliuloj povas analizi tiun ĉi historion multe pli bone ol mi. La unua pruvo de la praveco de la tezo estis prezentita de la liberiga milito de Ĉinio mem. Kiam Ĉiang Kajŝek, mezsomere de 1946, lanĉis militon kontraŭ la Popola Liberiga Armeo kaj la liberigitaj regionoj kiujn ĝi liberigis el sub Japanio, Ĉiang havis armeon de pli ol kvar milionoj da homoj jam armitaj de Usono por kontraŭbatali Japanion; li havis ĉiujn

armilojn transdonitajn de miliono da kapitulacintaj japanaj armeanoj, kaj aldonitajn militprovizajojn el Usono valorantajn du bilionojn da usonaj dolaroj. Li regis super regionojn havantajn pli ol 300 milionojn da loĝantoj, inkluzive ĉiujn grandajn urbojn kaj la plejparton de la ĉinaj fervojoj. Ekstere Kuomintang estis potenca sed interne ĝi havis fatalan malfortecon. Ĝi reprezentis la mortantajn klasojn, la grandajn bienulojn kaj kompradorajn burĝojn. Ili estis farantaj maljustan militon kontraŭ la bonstato de ĉina popolo. Ili ne povis gajni la subtenon de la popolo.

La liberigitaj regionoj enhavis nur iom pli ol 100 milionoj da loĝantoj kaj tiuj estis disigitaj en kelkaj areoj, kun malmulta komunikado inter si. Ili havis armeojn estis malpli ol triono de tiuj de Ĉiang kaj malbone armitaj. Sed la P.L.A. havis unu grandan posedadon. Ili estis batalantaj por interesoj de la ĉina popolo kaj povis gajni la subtenon de la popolo. Sur tiu ĉi subteno ili bazis sian strategion kaj taktikojn. La subteno de la popolo ne estis mem sufiĉa; estis necese ankaŭ organizi tiun ĉi subtenon per bonaj strategio kaj taktikoj. Ĉi tie Ĉinio estis feliĉa havante la grandan genion de Prezidanto Maŭ Zedong, kaj ankaŭ de multaj kapablaj kaj spertaj batalantoj.

KIAM Prezidanto Maŭ retiriĝis el Jan-an en frua marto de 1947, la plejmulto de la mondo kredis, ke la armeoj gvidataj de la komunistoj estis venkitaj. Eĉ la plej progresemaĵoj en Usono ne volis organizi por mi prelegojn por rakonti kion mi lernis en Jan-an. Ili diris: “La ĉinaj komunistoj estas forlavitaj; ili perdis sian lastan ĉefurbon.” Sed en malpli ol unu jaro la Popola Liberiga Armeo turniĝis de strategia defensivo al strategia ofensivo, kaj en aŭtuno de 1948 ili komencis preni la grandajn urbojn de nordorienta kaj poste tiujn de norda Ĉinio — Ĉangĉun, Ŝenjang, Ginan kaj Hjuĝoŭ. Malpli ol du jarojn post kiam mi adiaŭis Prezidanton Maŭ en Jan-an, liaj trupoj okupis Tianginon kaj Pekinon.

Tio ĉi estis la unua pruvo de la aserto pri papertigro kiun Prezidanto Maŭ faris en Jan-an.

La milito en Koreio donis alian ekzemplon. Kiam Usono sendis siajn armitajn fortojn en Koreion, ĝi estis rigardata kiel la plej forta milita potenco en la mondo ege super la aliaj. La Dua Mondmilito ruinigis U.S.S.R. sed Usono eliĝis kun tre malmulte da perdo kaj kun granda gajno en la riĉaĵo kaj en armiloj. Usono havis monopolon de A-bombo. Ĝi ankaŭ regis la Unuigitajn Naciojn tiel plene ke ĝi alportis UN en la korean militon kiel oficialan militanton. Kaj tiu ĉi milito estis farata eĉ ne kontraŭ unu malgranda lando, sed kontraŭ la duono de unu malgranda lando, la norda parto de Koreio. Trans Koreio estas la nove liberigita Ĉinio, kies registaro establiĝis malpli ol unu jaron kaj ankoraŭ ne tute liberigis ĉiujn partojn de la lando.

Laŭ la eksteraĵo de la du fortoj, ŝajnis ke Usono devis konduki nur malgrandan kolonian militon kaj su-


bigis la nordajn koreojn en kelkaj semajnoj kaj poste eble antaŭenpuŝiĝos tra la nordorientaj provincoj de Ĉinio kontraŭ U.S.S.R. En la komenco Ĉinio ne eniĝis en la militon, sed penadis per ripetaj avertoj persvadi Usonon halti ĉe la limo inter Suda kaj Norda Koreio. Nur kiam la usonaj trupoj jam estis bruligantaj koreajn urbojn ĉe ĉina landlimo kaj eĉ faligis bombojn en ĉinaj propraj provincoj, la ĉinaj volontuloj eniris Koreion. La ĉinoj kaj nordkoreoj estis mizere armitaj kompare kun la granda mekanikigita militmaŝino de Usono. Sed ili estis farantaj justan militon en defendo de siaj landoj. Ili repelis la usonajn trupojn, repelis foje kaj refoje iliajn ofensivojn, kaj fine devigis Usonon al armistiko.

Kiel la malvenko de Ĉiang Kajŝek estis turnopunkto en la ĉina longa batalo dum cent jaroj kontraŭ imperiismo, tiel la korea milito markis la turnopunkton en la usona regado mondskala. La momento kiam Usono alportis la Unuigitajn Naciojn en la korean militon markis la altan punkton en la monda prestiĝo de Usono. Ekde tiu ago, ĝi komencis kliniĝi. La kliniĝo de usona prestiĝo estas nun tutmonda. Ĝi komenciĝis en la milito en Koreio, kiu ŝajnis ĝia plej granda momento de potenco.

La plej okulfrapa ekzemplo hodiaŭa estas tiu de Kubo. Tiu ĉi malgranda insulo, sub la piedoj mem de la usona koloso, estis regata dum sesdek jaroj de usona monopola kapitalo. Sed Fidel Castro defiis Usonon per unu rimedo post alia. Vaŝingtono respondas per ĉiu speco de nereakta agreso, sed ne kuraĝas tuj komenci militon. Kio malhelpas la Pentagonon tuj sendi usonan mararmeon, kiel Vaŝingtono kutime faris por unu jarcento, kiam latinamerikaj landoj defiis Usonon? Kio malhelpas Usonon faligi H-bombon sur Havana, kiam, laŭpretende, ĝi havas sufiĉe da H-bomboj por "ekstermi la homaron"? Ĉu ĝi ne estas timo pri la efekto kiun tio havus sur la popolo de Latinameriko kaj ankaŭ sur la popolo de Usono?

En mono kaj armilaro imperiismo estas potenca. Vaŝingtono havas en sia zono milionojn da tunoj da pulvo kaj povas subaĉeti tutajn registarojn per dolaroj. Sed imperiismo havas fatalan internan malfortecon, ĝi ne povas funkcii sen iom da subteno de la popolo. Kaj la popolo de la mondo fariĝis ĉiutage pli konscia ke imperiismo malutilas al iliaj fundamentaj interesoj. Kio eltiris la anglojn kaj francojn el Suezio kiam ili jam invadis Egipton? Kio eltiris la usonajn trupojn el Libano, kiam ili estis invititaj de la libana ĉefministro, kiu estis ilia instrumento? Ĉu ĝi ne estis la aktiva morala juĝo de la tutmonda popolo, kiu inkluzivis ankaŭ la voĉojn de la popolo de Britio, Francio kaj Usono?

Kio estas la forto de imperiismo? Prezidanto Maŭ jam diris al mi en Jan-an: Ĝi kuŝas nur en la nekonscieco de la popolo. La konscieco de la popolo estas la fundamenta demando. La forto ne kuŝas en eksplodadoj aŭ oleputoj aŭ atombomboj, sed en la homo kiu ilin manipulas.



La Komunuma Brilo Envenas la Hejmon.

Novjara bildo de Ĉen Enjong

HODIAŭ la antiimperiisma revolucio tondras kaj erupcias tra la mondo, ĉar la subpremata popolo stariĝas en unu lando post alia kaj ĉiu nova nacio kiu stariĝas estas helpo al la aliaj. La rezisto de Kubo helpas Ĉinion kaj la popolo de Laoso helpas Kubon, ĉar kiel ajn potenca estus la Pentagono, ĝi ne povas ataki la tutan popolon de la tuta mondo samtempe. Tiu ĉi ne estas facila nek simpla batalo. Imperiismo havas multajn vizaĝojn; multaj nacioj jam gajnis politikan formon de sendependeco, tamen trovis sin ĉenligitaj ekonomie. Se la popolo tiam restas pasiva, trompita de iluzio de sendependeco aŭ la espero ke iu alia nacio eble liberigos ilin aŭ la timo al la imperiisma tigo, ili restas ĉenligitaj. Sed kie ajn la popolo konsciiĝas pri sia forto, kaj iliaj gvidantoj disvolvas solidan strategion bazitan sur la interesoj de la popolo, ili trovas ke la tigo estas papera.

Tio ĉi estas la granda vero de nia nuna epoko, kiun la aserto de Prezidanto Maŭ pri la papertigo klarigas.

Unu Tago ĉe la Produktbrigado

JAM estis vintro laŭ la kalendaro, sed la vetero ankoraŭ restis kia en suna printempo. Tuj apud la rivero Zigiang en Jijang-gubernio de Hunan-provinco, kie lokiĝis Fanglanhu-a Produkta Brigado de Giangnan-a Popola Komunumo, etendiĝis vasto de verdaĵo: la senlimaj kampoj kovriĝis per densaj vegetaĵoj uzotaj por sterko; aldone prosperis en riĉa verdo, tie kaj ĉitie, ĉe lag-anguloj, kanalbordoj, tritikplantoj, faboj kaj legomoj. La ora rizo de l' aŭtuna rikolto jam estis en grenejigita, sed la tero restis ĉie verda, kaj montris nenian signon de vintro.

Interkantado

Leviĝis la aŭroro, disiĝis la nebulo super Bajŝuj-lago. Sur la vasta supraĵo de la lago orbrile ondanta navede glitadis boatoj kolektantaj lagherbojn; sur la apudlagaj herbejoj sonoris ridado de virinoj kolektantaj razenojn, por sterkopreparo svinginte arĝentbrilajn fosilojn. Ili estis komunumanoj de la Unua Laborgrupo de Bajŝujhu-a Produkta Brigado klopodantaj ĝustatempe prepari sterkojn por la kulturado de la venonta jaro.

Meze de la lago sur la pruo de boato firme staris ne tre alta mezaĝa fortika viro, nigrebruna, kiu, kun la manikoj kaj pantalon-tuboj alte refalditaj, svingadis ambaŭmane herborastilon brue plaŭdante sur la akvo. Li estis k-do Leng Junĉang, sekretario de la partia filio. Sur la herbejo apud la lago diligente laboris juna virino en ruĝe desegnita vatita vesto, kun blanka tuko sur la kapo kaj ruĝenigra vizaĝo. Ŝi estis Hjue Hiĝen, la edzino de sekretario Leng.

Leng Junĉang traveturis la mezon de la lago kaj lerte supren levis grandan tufon da lagherboj, ĝuste tiam rapide alremis juna komunumano Caj Dongŝan. Okulumante al sia juna amiko en la najbara boateto, Lengĉjo diris ĝoje: "Nu, Dongŝan, defiu la Mu Guejĵing-ojn* sur la bordo."

* Nomo de legenda heroino el Norda Song-dinastio (960-1127 p.K.), kiu sukcese direktis la armeon en bataloj kontraŭ invadantoj el la nordo.



Aktive partoprenis la laboron marĉosterko-transportan la komunumanoj de Liping-brigado, Ĉangkaj-komunumo de Linĉuan-gubernio de Gianghi-provinco.
Foto de Hinhua.

"Bone!" Dongŝan ekkantis per bela alta voko:

*"Sun' leviĝas: la ĉielon tuŝas ruĝa inko,
Fluge glitas herbo-kolekte la boatoj.
Hej, atentu, vi, surbordaj Mu Gujĵing-oj:
Vete ni fariĝos venkaj laŭreatoj."*

"Jo-ho, jo-ho, jo-ho, jo-ho!" ĥore postkantis Leng Junĉang kaj la tuta aro de viraj membroj.

Aŭdinte la kanton Hjue Hiĝen tuj konsiliĝis dum momento kun la membrinoj sur la bordo, kaj ekrespondis per sonora montkanto:

*"Vigle svingas ni sen halto la pioĉojn.
Kaj la herbamas' jam altas pli ol homo.
Bone, do vi aŭdu, viroj sur la lago:
Venko de l' konkurs' estos sub nia nomo."*

"Joho, johu, johu, johu!" la virinoj ĉirkaŭ Hiĝen ankaŭ ĥore helpis per batalkrio.

La matena suno ruĝigis la lagon. Ekŝvitis la homoj sur la kapo. Kantoj, ridoj, ŝvebis super la lago kaj la ĉirkaŭaĵo.

En la Komunuma Manĝejo

Eksonis la sonorilo por tagmanĝo. Komunumanoj de Ŝangdukoŭ-a Produkta Brigado eniris sian komunan manĝejon "La Ruĝa Flago", ridante kaj babilante. En la ĉambro, la tabloj kaj seĝoj estis pure kaj bonorde aranĝitaj. Mezaĝulo kun blankaj antaŭtuko kaj buŝkovrilo eniris kun plado da vaporante rizajo kaj ridante ĝin metis sur tablon antaŭ la iuj membroj. Li estis la nove alveninta kuiristo, Liu Hjupo, vicsekretario de la parti-filio de la produkta brigado.

Sesdek-jara membro Tang Jaŭhian tuj rekonis sian parti-sekretarion kaj lin dekonsilis:

"Kamarado sekretario, tiel okupata vi ja estas, ne necesas ke vi mem prizorgu ĉi tiun bagatelajon!"

"Oĉjo Jaŭ, la ĉiutaga vivo de la amaso estas grava afero, kion ni devas prizorgi malgraŭ la okupateco!" Liu Hjupo klarigis ridante.

Rapide disvastiĝis la novaĵo ke sekretario Liu laboras kiel kuiristo en la komunuma manĝejo. La pli ol sepdekjara avino de Vang Ĝiaveng komentis manĝante:

"Ĉi tiu manĝo estas bone preparita: haveblaj estas kaj rizkaĉo kaj rizajo vaporumita, kaj nek lolgrajnoj nek rizŝeloj sin trovas en ili. Tio ebligis ja dank' al la enkomandiĝo de nia parti-sekretario."

"Ankaŭ la flankmanĝaĵoj estas bone faritaj," aldonis alia membro Ĝang Gjupu. "Multspecaj kaj bongustaj ili estas. Manĝinte tiajn manĝaĵojn, oni havos senfinan entuziasmon por laboro!"

"Ĉu ni daŭre havos tian bongustan manĝaĵon, oĉjo Gjupu?" naive intermetis unuaklasa lernanto Tang Jaŭji.

"Kompreneble!" certigis sekretario Liu, kiu disdoninte la rizajon, nun alportis sitelojn da boligita akvo. "Ekde hodiaŭ," li daŭrigis gajhumore, "ĉiuj kadroj de la tuta brigado laŭvice servos kiel kuiristoj en la komunuma manĝejo. Ĉerte pli kaj pli bonaj estos niaj manĝoj."



*La Sekretario de Partia Komitato Estas Ĉi Tie.
Ĉinstila pentraĵo de Huang Gjuno*

Sur la Digo

Vespere, ruĝaj nuboj pendis ĉe la fora horizonto. Laŭlonge de ambaŭ flankoj de la ekŝiĝinta digo freŝe verdaj, fortaj plantidoj de fabo kaj tritiko aspektis eksterordinare ĉarmaj sub la brilo de la subiranta suno kaj la karesoj de venteto. Tiam, ĉe la digo de la Dua Laborgrupo de Maŭĝiajuan-a Produkta Brigado, kelkaj membroj estis diskutantaj sidante en tritika kampo kun nudaj piedoj pri la laborfruktoj de la tago.

"Ĉi-posttagmeze, ni kvinope plenumis la laborojn de sarkado kaj sterkado en la kvar muoj de tritiko kaj fabo. Ni ĉiuj laboris ne malbone!"

La parolinto estis altstatura grasulo mezaĝa. Li estis Leng Ŝikjun, sekretario de la Partia Subkomitato de la produkta brigado.

"Ĉijare, la produktaj normoj de vintraj malĉefaj grenoj estis pli racie fiksitaj kaj la kulturado komenciĝis pli frue, do estas certe, ke ni superplenumas la fiksitan produktan kvanton," ĝoje rimarkigis maljuna kamparano Leng Jinglian.

Leng Ŝikjun kapjesis ridetante, kaj ŝanĝis la temon de parolo: "Baldaŭ venos la tempo por ripozo, lasu nin rapide fintaksi la faritajn laborojn ĝustatempe. Laŭ mi, Oĉjo Jinglian plenumis sian taskon de sterkado rapide kaj bonkvalite, mi proponas, ke lia laboro estu taksita kompare pli alte."

"Kaj Sekretario Leng," unu virino nomata Peng Juĝeng interrompis, "vektoportadis sterkon dum la tuta posttagmezo. Tio estas peza laboro kaj li laboradis

sen ripozo, do li rajtas havi eĉ pli altan takson, ĉu vi konsentas?”

“Jes!” la membroj unuvoĉe aprobas. Tuj poste, unu post alia ili taksis siajn plenumitajn laborojn laŭ demokratia principo: Leng Ŝikjun, 5 poentoj; Oĉjo Jinglian, 4½; Peng Juĝeng, 4, kaj la ceteraj du membrinoj po 3½. Ili ĉiuj superplenumis la labornormon.

Leng Sikjun forfrotis la koton sur siaj manoj, kaj prenis el sia poŝo fontoplumon kaj laborregistran kajereton kaj laŭkutime enskribis siajn laborpoentojn. Tiam la membroj kolektis la ilojn kaj ekiris hejmen kun kora ĝojo. Leng Ŝikjun vektportis la malplenajn sterksitelojn kaj iris ŝultro-ĉe-ŝultre kun oĉjo Jinglian ĉe la malantaŭo. Ili estis diskutantaj pri la kulturado de riĉrikolta tritiko

Vesperkunveno

Vespere, la Kultura Amuzejo de Sangdukoŭ-a Manĝejo pleniĝis je homoj—jen komunumaj membroj sin amuzis gaje sub petrollampoj per ludo de tamburo, tamtamo, kordaj kaj blovaj muzikiloj kun kantoj.

En la grupeto de muzikludantoj estis rimarkinda mezaĝulo: homo kun blanka tuko surkape, en blua kostumo, altstatura kaj ridetanta, lerte frapadas la grandan tamtamon. Li estis Leng Guohjuan, vicsekretario de la partia komitato de la Komunumo kaj sekretario de la partia subkomitato de la produkta brigado.


Leng Guohjuan gajhumore finludis la uverturan tamburtamtamadon kaj ĉirkaŭrigardinte al la spektatoro demandis laŭte: “Komunumanoj, kiun operon vi deziras ĉivespere?”

“La Oran Feniks-monton,” kriis la gejunuloj rapide.

“Ne! Kantu ‘Viv-mortan Tabuleton,’” la gemaljunuloj havis malsaman opinionon.

“Eone, ni kantas ambaŭ! Tamen, unue ni kantu iun memkompilitan kanton.” Tion dirante, li buŝgestis al la du huĉin*-ludantoj ĉe sia flanko. Belsona me-

* huĉin-o: ĉina dukorda muzikilo kun cilindra resonilo kaj arĉo produktanta sonojn pli malpli similajn al tiuj de violono.



Ĉe la kamprando ripozas komunumanoj de la 5-a produkta grupo, Tonghin-produktbrigado, Janĉiaŭ-komunumo apud Ŝanhajo.

Foto de Hinhua

lodio de huĉin-oj ekŝvebis tra la ĉambrego. Tuj sekve ekaŭdiĝis dueto de gejunuloj:

*“La saĝa politiko de l’ Partio
estas bonvena ja en ĉies koro.*

*La kadroj kaj l’ amas’—jam en kora unio
por ke estiĝu en produkto plendisfloro. . .”*

Lerte klakigante la taktomarkajn bambu-tabuletojn por direkti la muzikludantojn, Leng Guohjuan zorgeme observis la esprimojn sur la vizaĝoj de la aŭskultantoj. La membroj fiksrigardis al Leng Guohjuan kaj la ludantojn sub lia gvido. Jen la multnombraj nigre ruĝaj vizaĝoj sub la brilo de la petrollampoj brilas kun rido.

“Tage ni laboras, vespere ni sin amuzas per operoj. Jen vere kombinitaj estas laboro kaj ripozo.” La patro de Gujhiang returnis sian kapon kaj diris al ŝia bopatrino.

“Ankaŭ la parti-sekretario partoprenas la operludon. Tio estas senprecedenca afero en la historio!” La patrino de Hiangveng jetis rigardon al la maljunulo, kaj eksentis ĝojon ne direblan tiel ke ŝi ne sciis kion diri.

“Dong, dong, ĉjang! dong, dong, ĉjang!” eksonis la tambur-muziko kaj eksplodiĝis aplaŭdo, ridado kiam la gejunuloj finkantis la unuan parton, kaj la tuta halo ekbolis de ĝojego

Okulo de He Ŝanhua

GAŬ Hiuĝen estas juna okulistino, kiu savis de blindeco dum unu jaro pli ol 30 pacientojn kies okuloj estis akcidente vunditaj aŭ brulvunditaj per ĥemiaĵo. He Ŝanhua estas unu el tiuj pacientoj kies kazoj estis treege seriozaj.

Tio okazis en septembro lastjare. Iumatene, venis virino al la ĉambro por urĝaj konsultoj, portante infanon kun sanganta okulo, kriegantan kaj ploregantan. La infano havis nur ok jarojn, He Ŝanhua estis lia nomo. Kiam li rigardis laboristojn fendigi ŝtonojn, malfeliĉe desaltanta fragmento trafis lian maldekstran okulon kaj vundis la okulglobon.

La kuracistino ekzamenis la vundon kaj trovis ke la kondiĉo estas tiel serioza, ke, se la maldekstra okulglobo ne estos forprenita, pli serioza konsekvenco povos rezulti, kaj endanĝerigos eble ankaŭ la dekstra okulo.

La infano des pli ploregis kaj kriegis, kiam li aŭdis pri neceso de operaciado. Viŝis larmojn ankaŭ la patrino. Gaŭ Hiuĝen konsolis la patrinon, por ke ŝi ne tro maltrankviliĝi, kaj samtempe intime vortkarezis la infanon, pensante en si:

“Okuloj estas la plej kara objekto de la homo. Infanoj estas niaj estontaj anstataŭantoj, kaj iliaj okuloj servas por konstrui komunisman socion. Ilin oni devas nepre savi!” Gaŭ Hiuĝen decidis ripari kaj konservi la okulglobon kiun oni devus forpreni.

He Ŝanhua estis portita en la operacian ĉambron. Gaŭ Hiuĝen persvadis lin pacience kaj iom post iom lin kvietigis.

Nun la doktorino operaciis la infanon, forprenis la sangbulon, kaj riparis la vundon. Tiel, kiam finiĝis la delikata operacio, ŝia ĉemizo estis tramalsekigita per ŝvito. Tamen, post kelkaj tagoj, la okulo kiu estis iomete plibonigita post la operacio denove malboniĝis. Froston enspiris Gaŭ Hiuĝen, kiam levinte la gazon ŝi ekvidis, ke sub la korneo pleniĝas sangbulo kaj koloras eĉ purpurnigre. “Tiamaniere, la okulo certe ankaŭ blindiĝos, eĉ se ĝi ne estos forprenita!” ŝi pensis.

Ĝuste tiam, He Ŝanhua demandis naive: “Onklino Gaŭ, ĉu mia okulo saniĝis? Kiam mi povos vidi?”

Gaŭ Hiuĝen subpremis sian internan ekscitiĝon kaj diris per kvieta voĉo, “Tre baldaŭ, bona infano, jam preskaŭ resaniĝos la vundo, ne estu senpacienca!” Sed en ŝia koro sonas alia voĉo: “Ne estas plu prokrasteble. La okulglobo devas esti forprenita!”

“Onklino Gaŭ, kiam mia okulo komplete resaniĝos, mi petos panjon aĉeti por mi bildlibron. Kaj mi volas

viziti lernejon!” La infano parolis kun okuloj fermitaj, plena de revoj. “Kiam mi grandiĝos, onklino Gaŭ, mi fariĝos ŝoforo kaj kondukos aŭtomobilon, tiel grandan, tiel grandan aŭtomobilon al Hangĝou, al Pekino.” He Ŝanhua daŭrigis eldiri al doktorino Gaŭ sian volon. La konfido de la infano nur pliakrigis ŝian internan lukton.

En ŝia kapo interluktis pensoj. “Mi jam plenumis mian devon per ĉiuj eblaj penoj, nun mi povas fari nenion ol forpreni tiun ĉi okulglobon! . . .” ŝi pensis.

Sed samtempe, en ŝia koro alia penso sin demandis kun forto: “Ĉu vere nenio estas farebla? Ĉu oni vere povas nur forpreni la okulglobon? Ĉu mi lasos nian estontan anstataŭanton tiamaniere blindiĝi antaŭ miaj okuloj? Kaj liajn revojn tiel forvaporiĝi? . . .”

Ŝi ekpensis pri la brava kaj heroa stilo de laboristoj: La laboristoj de la Giangnan-a Ŝipkonstruejo, rompinte la rutinajn regulojn, finis la konstruadon de 5,000-tonela ŝipo en 35 tagoj. Se ili povis krei tian miraklon, kial ni medicinaj laborantoj ne?

Gaŭ Hiuĝen rememoris la instruon de la Partio: La popola kuracisto devas, laŭ la spirito de la ĝenerala linio, ĉiurimede altigi la kuracefikon kaj mallongigi la daŭron de terapio kaj prizorgi la pacienton tutkore, konsiderante la suferon de la paciento kiel sian propran.

“Prave!” Gaŭ Hiuĝen decidiĝis. “Mi devas savi la okulon de He Ŝanhua de blindeco per ĉiuj eblaj rimedoj!”

He Ŝanhua estis ree sendita en la operacian ĉambron, kaj la dua operacio komenciĝis.

Gaŭ Hiuĝen aplikis la metodon de trapiko ĉe la antaŭĉambro de la okulo por forigi la amasitan sangon, kaj la metodon de akvoŝprucigo por solvi la sangbulon, sed ambaŭ restis senefikaj. Ŝia koro tiel streĉiĝis, kvazaŭ ĝi ĉesus bati.

“La lasta rimedo estas nur injekto de medikamento!” ŝi pensis. Sed, tenante la medikamenton en la mano, ŝi hezitis. “Ne! Kvankam la likvaĵo povas



solvi la sangbulon, sed ĝi ankaŭ povas detruĝi la historion. Ĝin oni ne devas uzi!"

La tempo forpasis minuto post minuto, kaj dikaj ŝvitgutoj elfiltrigis de la frunto de Gaŭ Hiuĝen. Restis al ŝi jam ne multe da tempo disponebla por pripensadi. Ŝi decideme prenis pinĉileton, por savi la okulon de He Ŝanhua per tiu plej lasta kaj plej malfacila rimedo — elpinĉi la sangbulon.

Ŝi elpinĉis la unuan pecon, ne, nur filamenton, ekstreme maldikan filamenton de la sangbulo! Kaj alian filamenton kaj alian. . . .

Estis tuta maso da sango sub la korneo, kaj ŝi devis elpinĉi filamenton post filamento. Ŝi devis fari tion ekstreme zorgeme, ne estis tolerebla plej malgranda fuŝeto, ĉar sube estis la kristalino, kiu detruigis de plej malforta tuŝo, kun sekvo de blindiĝo. Ĝuste sur tiu ekstreme kara kaj ekstreme facile difektebla kristalino Gaŭ Hiuĝen devis fari la elpinĉadon de sangbulo.

La tuta korpo de Gaŭ Hiuĝen malsekiĝis per ŝvito, sed ŝi tion tute ne sentis dum sia alta nerva streĉiĝo. Ŝi koncentris sian tutan energion al sia mano, al siaj fingroj. Pasis dek minutoj, pasis duonhoro, pasis unu horo. . . .

La vido de Gaŭ Hiuĝen komencis nebuliĝi. Ŝi baraktis por eviti malprecizecon de la vido, ĉar ŝi konsciis ke plej eta malpreciza vido de la okuloj kaj plej eta malpreciza movo de la mano kaŭzos neripareblan perdon!

Pli ol unu horo forpasis de kiam Gaŭ Hiuĝen komencis la streĉan laboron. Fine ŝi elpinĉis la lastan filamenton de la sangbulo. Kiam ŝi finis la operacion kaj forlasis la pacienton, ŝi sentis kapturiniĝon, kaj apogante sin sur fenestrojlo, faris kelkajn profundajn spirojn. Sed ŝia koro estis plena de ĝojo, ĉar la okulo de He Ŝanhua estis fine savita!


Post pli ol kvar monatoj, Gaŭ Hiuĝen venis al la domo de He Ŝanhua. Ŝi ne trovis la infanon, ĉar li jam efektiviĝis sian volon — frekventi lernejon.

La patrino de He Ŝanhua estis tiel tuŝita pro la alveno de la doktorino, ke ŝi firme prenis ŝian manon, ne povante eldiri eĉ unu vorton.

La patrino akompanis Gaŭ Hiuĝen al la lernejo. He Ŝanhua estis en la klaso. La patrino kaj Gaŭ Hiuĝen silente enrigardis de ekstere de la lernĉambro. Ili vidis ke He Ŝanhua sidis tie kaj lernis atenteme turnante siajn brilajn okulojn jen al la nigra tabulo, jen al sia libro. Gaŭ Hiuĝen tuj rememoris kion He ŝanhua iam diris: "Kiam mi grandiĝos, mi fariĝos ŝoforo kaj kondukos aŭtomobilon al Hangĝou, al Pekino, al lokoj tiel malproksimaj. . . ."

Doktorino Gaŭ ekridetis, kun sia koro plena de ĝojo.

La leciono finiĝis, la geknaboj elflugis kvazaŭ birdetoj. Kiam He Ŝanhua staris antaŭ la okulistino,



Kuang Peilje:

La Tero Patria Printempas Bril-brile

Montkantojn mi kantis ja ankaŭ pasinte,
sed tiam la kantoj maldolĉis absinte.
Hodiaŭ mi kantas montkantojn sen ĉeso
pri ' Socialisma Eden' de progreso.*

*Kantado — sterkmasoj pli altas ol monto
kaj ĉie abundas rikolto de grenoj.
Kantado — or-brilas jen nia estonto,
kaj ĉie impetas konstru-entreprenoj.*

*Kantado — ti-kiuj en far' malimpetis,
nun ĉiu-sezone tre bone laboras.*

*Kantado — kleriĝis la analfabetoj;
teknik-renovigoj, inventoj buntfloras.*

*Kantado — Partion sekvante l' popolo
jam ĉian obstaklon konkeras facile.
Beliĝas Patrio kun ĉiu la horo,
La tero patria printempas-brilbrile.*

* Montkanto: speco de popolokanto.

Trad. Laŭlum

liaj brilaj kaj klaraj okuloj flagris per neordinara brilo.

"Onklino Gaŭ!" laŭte vokis la estonta ŝoforo, sin jetante en la brakojn de Gaŭ Hiuĝen.

Tra la Mallumo antaŭ la Tagiĝo

—Rememoro pri la Pekina Universitato en la “Aprila Ŝtormo” en 1948—

“Hejmeniro” por Alporti Fajrsemon

Dum la vintra libertempo de 1947, subite multiĝis junaj vojaĝantoj sur la vojo de Jangliuking, Tiangin al la Liberigita Regiono. Sur iu bovĉaro sidis paro de gejunuloj verŝajne novaj geedzoj: La junulino portis vatitajn vestojn kun ruĝa desegno kaj sur la kapo tukon blue desegnitajn; kaj la viro, longan vatitan robon el blua tolo kaj feltan ĉapon. La ĉaro venis al la lasta gardata pasejo de la blanka regiono, kaj ekhaltis. Antaŭ ĝi brua moviĝado regis la placon, kie haltis vicoj da ĉaroj trapasantaj ĉu norden aŭ suden. La arogantaj kaj impertinentaj kontrolantoj jen ĉi tiun kaptis, jen tiun piedpuŝis. Al tiuj, kiuj ŝovis al ili en la manon arĝentajn monerojn aŭ alian subaĉeton, ili kriis “for!” kaj lasis ilin preterpasi; al tiuj, kiuj ne tion faris, ili ĉion malordigis kaj renversis, kaj lasis ilin for nur post konfisko de la valoraĵoj. Klare vidinte tion kun okuloj larĝe malfermitaj, ardiĝis forta indigno kaj malamo en la koro de la gejunuloj. Sed memorante, ke ili havas pli gravan taskon, ili sintenis aplombe por facile trapasi la pasejon.

Alpaŝis du armitaj uniformuloj kaj unu civile vestita politika spiono. Ili kontrolis la personajn atestilojn de la gejunuloj: unu el ili estas komizo de iu firmao kiel skribite kaj la alia, lia novedzino.

“Kien vi iras?” demandis la politika spiono en civila vesto.

“Al Ginan por viziti la gepatrojn,” respondis la virino kaj samtempe kroĉiĝis timeme al la maniko la novedzon.

La tri ulaĉoj ilin okule ekzamenis de la kapo ĝis piedoj por momento kaj poste malligis la pakajon kunportitan de la virino kaj traserĉis ĝian enhavon. Sed trovinte nenion alproprigindan, ili fine forjetis la pakajon kaj kriis “for!”

Tiu paro de “novaj geedzoj” tiel trapasis la blokadon kaj revenis al sia “hejmo” — la Liberigita Regiono. Ili estis subteraj komunistaj partianoj en la Pekina Universitato, kaj revenis al la Liberigita Regiono por lerni partiajn dokumentojn kaj resumi la laborojn de la studenta movado en la vintra libertempo.

En tiu vintra libertempo, lernejoj en la blanka regiono ĉiuj sendis kelkajn kamaradojn al la Liberigita Regiono. Tie ili feliĉe lernis la ĵus publikigitan verkon de Prezidanto Maŭ Zedong *La Nuna Situacio kaj Nia Tasko* — revolucia alvoko por fine elimini la reakciularon, kiu resumis la spertojn en la laboroj de studenta movado deponante la movado “kontraŭ perforto” kaj kontraŭ Usono. Kaj antaŭ la fino de la libertempo ili revenis al siaj lernejoj.

En la Pekina Universitato, tiu ĉi grava dokumento estis diskonigita en la Partio de la kamaradoj revenintaj de la “hejmo”. Tuj poste la partianoj tion vaste

Printempo

Skulptaĵo de Ĝaŭ Zongzaŭ



diskonigis al la amaso per siaj propraj vortoj, pere de la murgazetoj de diversaj asocioj, societoj, klasoj kaj fakultatoj kaj de diversaj kunsidoj. Samtempe ili el-tranĉis tiutemajn artikolojn el la tagjurnalo "Liberigo" kaj la gazeto "Popolamaso", du organoj de la Ĉina Komunisto Partio, kaj ilin publikigis en la murgazetoj. . . . Tiel la spirito de tiu dokumento al batalo alvokanta kaj la batalon direktanta profunde penetrigis en la korojn de la vastaj junaj gestudentoj. Ili flustris inter si: "Baidaŭ jam disfalos la reakcia reĝimo!"

Tiam la ĉina popola revolucia milito venis jam al turniĝa punkto. La brava Popola Liberiga Armeo jam repuŝis la ofensivon de la armeo kun kelkaj milionoj da soldatoj de Ĉiang Kajŝek, la lakeo de Usono, kaj transiris de taktika defensivo en la stadion de grand-skala ofensivo. Ne nur la efektivaj fortoj de la malamiko sur ĉiuj batalkampoj estis daŭre ekstermataj, sed ankaŭ venke antaŭenpuŝiĝis la bataloj en la regionoj regataj de Kuomintango. Ĉiang Kajŝek troviĝis jam en la sieĝo de la tuta popolo. La alvoko "aŭroro estas antaŭ ni kaj ni devas peni!" ĉiam instigis la batalspiriton de la studentoj kaj semis fajrerojn por bruligi la subteran fajron ankoraŭ pli arda.

Preludo de la Ŝtormo

Tage kaj nokte la subteraj organizoj de la Partio klopodis unuigi la studentojn kaj instruistojn de la tuta universitato renkonte al nova batalo. Por malhelpi la studentan movadon, la malamiko, siavice, intense aplikadis siajn rimedojn — dissplitigo kaj subpremado. Unuflanke, elpasis mem s-ro J. Leighton* Stuart, maskito kiel edukisto en Ĉinio. Li kuradis inter la t. n. demokratoj-individuistoj kune kun Hu Ŝi, la reakcia "instruitulo" kaj la tiama rektoro de la universitato kaj Ĉen Hjueping, helpanto de la lasta, kantante unu akompanante al alia kun celo pere de ili disvastigi inter la studentoj iluzion pri Usono kaj Ĉiang Kajŝek. Samtempe ili utiligis la gazeton "Observado" por trumpetadi la t. n. "trian vojon". Aliflanke, la momento de amasbuĉado estis aranĝata. Estis fonditaj "Brigado por Subpremi Ribelon" kaj "Speciala Kriminala Tribunalo", plilongita la tempo de malpermeso de nokta irado kaj farata la ĝenerala kontrolado de la loĝantaro ktp. . . .

* Usonano naskita en Ĉinio 1876. Li estis dekomence fidela plenumanto de la kultura agresado de usona imperiismo en Ĉinio. Li laboris kiel misiisto de 1905, kiel rektoro de Janging-universitato (establita de Usono en Pekino) de 1919. De 11-a, julio 1946 li fariĝis usona ambasadoro ĉe la Kuomintang-a Ĉinio, aktive subtenis la Kuomintang-ajn reakciulojn en ilia kontraŭpopola civilmilito kaj faris diversajn politikajn komplotojn kontraŭ la ĉina popolo. Li forlasis silente Ĉinion la 2-an de aŭgusto 1949, kiam plene fiaskis ĉiuj klopodoj de Usono por malhelpi la venkon de la ĉina popola revolucio.

Por frakasi la intrigon de la malamiko kaj efektivigi mobilizadon al batalo, la Studenta Federacio de Norda Ĉinio organizis, kiam venis la printempa libertempo, festivalon de la lernejoj en Bejping (tiama nomo de Pekino) kaj Tiangin. Vespere de la 28-a de marto malfermiĝis sur la Demokratia Placo de Pekina Universitato, kampfajra kunveno de 20,000 studentoj. Arde brulegis la fajro kaj la koroj de la gejunuloj varmigis unu la alian, kvankam ankoraŭ iom frosta estis la vespera vento en marto. En la kunveno estis emfazita ankoraŭfoje la signifo de la alianca defendo de la studentaj asocioj de la ok altaj lernejoj en Bejping kaj Tiangin, kaj farita la solena ĵuro: "Tiel en la malfacila kiel en la facila tempo, ni vivos ĉiam kune! Se unu lernejo estos persekutata, ĝin apogos ĉiuj sep aliaj! Se unu studento estos endanĝerigita, lin savos ĉiuj ceteraj!"

La sekvintan tagon de la vespera kunveno estis la datreveno de la morto de la 72 martiroj de Huanghua-gang, kiuj falis en la revolucio por renversi la feŭdan regadon de King-dinastio (1644-1911 p. K.). Tiu ĉi tago estis fiksita de Kuomintang-registaro kiel Junulara Festo. Utiligante tiun laŭleĝan okazon, oni organizis ree sur la Demokratia Placo amasan kunvenon por rememori la revoluciajn martirojn kaj invitis kelkajn progresemajn profesorojn fari en ĝi paroladojn.

La kampfajra vespera kunveno jam timigis la malamikon. En tiu mateno, ĉe ĉiuj vojkruĉiĝoj, kiuj kondukas al Ŝatan, la centra sidejo de la Pekina Universitato, staris tri vicoj da soldatoj kaj policanoj kun ŝargitaj pafiloj. Ili kontrolis la trapasantojn kaj malpermesis studentojn de aliaj lernejoj eniri la Pekinan Universitaton. Ekster la Ruĝa Domo de la universitato amasiĝis sablosakoj kaj stariĝis dratpikilaj barikadoj. Garnizonaj aŭtoj tien kaj reen kuris senĉese fajfante por krei etoson de teruro. Sur ĉiuj stratoj proksimaj al la Pekina Universitato estis plenplenaj de soldatoj, policanoj kaj politikaj spionoj en civilaj vestoj.

Tamen la memora kunveno okazis laŭplane. Ni instalas sur la murojn megafonojn, donante politikan lecionon al la soldatoj, policanoj, ĝendarmoj kaj politikaj spionoj, kiuj sieĝis nian universitaton, kaj por ke nia justa voĉo enpenetru ankaŭ en la korojn de la urbanoj. Je la fino de la kunveno estis proklamita ke por tri tagoj strikos la studentoj kiel protesto al la armita sieĝo farita al nia universitato.

La Kuomintang-a garnizona komandanto Ĉen Giĉeng kiu koleriĝis pro ĉagreniĝo kaj honto, tiam publike deklaris, ke li ne bedaŭros esti ekzekutisto por amasbuĉi la studentojn. Estis intense entreprenata intrigo por persekuti la studentaron, kaj korpo-kontraŭ-korpa lukto estis fermentata kaj maturiĝanta. Post ripetitaj kaj diversmanieraj propagandoj kaj mobilizadoj la studentoj ankaŭ tute pretiĝis spirite, kaj senpacience atendis la venon de la ŝtormo.

Noktmeze de la 5-a de aprilo, pli ol 50 politikaj spionoj transrampis la ĉirkaŭmuron de nia universitato kaj ŝtele atakis la Demokratian Placon. Ili forŝiris la murgazetojn kaj mesaĝojn, kaj surgluis anstataŭe reakciajn sloganojn: "For la studentan strikon!", "For la kontraŭpersekutadon!", "For la Federacion de la Studentaj Asocioj de Norda Ĉinio!" ktp.; parto el ili invadis en la oficaĵn ĉambrojn de la kantogrupoj La Tero kaj Ŝatan-horo, detruis la oficejojn, forrabis la librojn, ĵurnalojn kaj ĉiujn aliajn objektojn, kaj poste forveturis sur ŝarĝaŭto.

La sekvintan matenon, vidinte la Demokratian Placon kaj la ĉambrojn post la katastrofo, ĉiuj ege indigniĝis. La Partio tiam montris al la amaso, ke tio estas signalo de granda persekutado, kaj alvokis ĉiujn sin pretigi por rebati la atakon de la reakciularo. Nur en unu tago niaj murgazetoj kaj protestoj kontraŭ la rabado de la politikaj spionoj denove plenigis la "Demokratian Muron".

Matene de la 8-a de aprilo, la Garnizona Komando denove sendis multe da soldatoj por sieĝi la Pekinan Universitaton kaj alsendis ordonon de aresto de la 12 respondeculoj de la studenta asocio kaj aliaj organizaĵoj, "instigantaj la studentan strikon". Indigna fajro tuj ekbrulis tra la tuta universitato. El la Ruĝa Domo sonoris alarma sonorilo. Ĉiuj studentoj de la universitato alvarmis sur la Demokratian Placon. Por protekti la 12 studentojn, kies nomoj troviĝis en la listo de arestordono, la studentoj ĉirkaŭis ilin per multaj cirkloj formitaj per vicigitaj benkoj. Ĉiuj ĵuris, ke se la soldatoj kaj policanoj eniros plenumi areston, ili sin defendos per fortikajo konstruita el iliaj propraj korpoj. Troviĝis en la defendaj cirkloj ankaŭ multaj profesoroj de la universitato.

Batis la dekdua, kaj jam pasis la templimo en kiu oni devis transdoni la arestendulojn laŭ la ordono.

Duonon post la 4-a ptm., la malamiko komencis retiriĝi antaŭ la firme unuiĝita forto. Ĉen Giĉeng proponis intertraktadon je la kondiĉo de retiriĝo de la Pekina Universitato el la Federacio de Studentaj Asocioj. La respondo de ĉiuj pri tio estis firmdecida "Ne!" Li proponis poste areston de nur 6 studentoj. Sed respondis la 12 studentoj: "Se ni devus iri, kune iru ni, ĉiuj dekdu!" kaj persistis ĉiuj studentoj ke oni lasu neniun arestita, ĵurante: "se unu arestita, ĉiuj en la malliberejon kune!" Ili interplektis siajn brakojn unu kun alia kaj manifestaciis kontraŭ la reakciularo per firma unuiĝo. Foje kaj refoje rompis la streĉan atmosferon kaj skuis la placon la heroa batalkanto:

Unuiĝo estas forto!

Unuiĝo estas forto!

Ĝi estas fero,

Ĝi estas ŝtalo,

.....



Kaj kontraŭ la faŝistoj fajru! Ili—nia celo.

Morton al la maldemokrata sistemo!

Al la nova Ĉinio, brilas dekmilmetra radiaro!


"Ni postulas disŝiri la arestan ordonon!" aŭdiĝis tondra protesto el la amaso.

"Disŝiru ĝin!"

"Disŝiru!"

Ĉiuj levis la pugnojn. La aresta ordono de la malamiko estis dispecigita en la tondra muĝado.

La forto de la amasa batalo skuis la blankan teroron. Multaj studentoj klare sciis, ke en ĉiuj policejoj proksime de la Pekina Universitato troviĝas sekreta malliberejo de Kuomintango. Kaj proksime situas ankaŭ la famaĉa nesto de politikaj spionoj, ke ĉiu ajn, kiu ne volas vivi humile sub la despoteco de la usona imperiismo kaj Ĉiang Kajŝek, povos esti ĉiminute enjetita en ĝin kaj torturata per diversaj malhomaj turmentadoj, ekzemple sidi sur torturbenkon, esti enversita per kapsika fluidajo tra la naztruoĵ k. s. Sed la amason instruis la ripetitaj bataloj. Ĉiuj komprenis, ke nur per batalo en unuiĝo oni povas sin savi kaj



公社工厂里第一批产品
一九六零年四月常翰柳画

La Unuaj Produktajoj de Komunum-fabriko

Skizo de Ĉang Hanĉing



Mateno en Pizangaro

蕉林晨曲

一九六零年



蘇州園志
卷之九
園九
四



Skizo de Šaũ-monto

Ĉinstila pentraĵo de Duan Ĉianhu

timemo sub la glavo de la malamiko signifas morton. Kaptante tiujn ĉi okazojn la Partio aranĝis multajn kunsidojn, mobilizis studentojn viziti profesorojn kaj surgluigis sur muroj ĉirkaŭ la tuta Demokratia Placo per sloganoj de voĉoj justaj, por ke solidariĝu ĉiuj en la batalo, kaj kresku la batalspirito por rebati pluan persekutadon de la malamiko.

Decideme Rebati la Perforton de la Malamiko

Meznokte de la 8-a tago, la malamiko turnis sian celadon al la Bejping-a Instruista Universitato kaj surprize ĝin atakis. Du ŝarĝaŭtoj da politikaj spionoj kun maske farbitaj vizaĝoj kaj grandegaj buŝumoj (ĉar multaj el ili estis sekretaj spionoj en la universitato mem, kaj timis, ke oni ilin rekonos), kunportante ferbastonojn en la manoj, enŝteliĝis en iun dormoĉambbron kaj donis bastonbaton al ĉiu el naŭ profunde dormantaj studentoj, kiuj tuj svenis eĉ sen malfermo de siaj okuloj. Ilia sango ŝpruciĝis el la kapo maku-lante la litkovrilojn kaj la murojn. Ĉiuj tiuj studentoj estis jetitaj sur la ŝarĝaŭtojn kaj forprenitaj en la frosta aprila nokto, escepte de unu kiu sukcesis elŝiri sin kaj revenis en la universitaton. Krome, la politikaj spionoj entrudiĝis ankaŭ en la bibliotekon kaj oficoĉambbron de la grupo de kolektiva manĝado kaj detruis la librojn kaj meblojn kaj forrabis la vestojn, monon kaj ĉion valoran.

Ĝuste kiam la politikaj spionoj estis farantaj la perfortaĵojn, iu sin liberigi de ilia armita gardado kaj sonorigis alarmon per urĝemaj sonorilbatoj. Studentoj en ĉiuj dormoĉambroj eliris kaj la politikaj spionoj fajfante forfuĝis kiel rabiaj hundoj.

Kiam tiu ĉi okazintaĵo estis informita en la ceteraj universitatoj, la subteraj partiaj ĉeloj tuj organizis la amason viziti la lokon kaj raporti al la studentaro kion ili vidis. Ĉies koroj preskaŭ krevis pro kolero. Ili decideme proklamis: "Tutfortan subtenon al la studentoj de la Instruista Universitato!"

Tiam la subtera parti-organizo decidis tuj mobilizi ĉiujn altajn lernejojn en Bejping por rebati la reakcian perforton por perdi neniun momenton.

Je la naŭa matene, la studentoj de la Bejping-a Instruista Universitato ekiris al la reakcia Rezidejo de Ĉiang Kajŝek por prezenti postulon de repago de la sanga ŝuldo. Tion apogis la unuaj sin movante la studentoj de la Kvara Fakultato de la Pekina Universitato. La studentaj trupoj amase ĉirkaŭis la enirejon de la Rezidejo atendante la alvenon de la trupoj de aliaj lernejoj. Tiam unu studentino de la Bejping-a Instruista Universitato raportis antaŭ la trupoj la pasintnoktan okazintaĵon, kiel ŝiaj kunlernejanaj estis batitaj kaj levis sangvestojn akuzante: "Jen estas sango! Sanga ŝuldo!" La malĝoja kaj indigna voĉo resonis en la aero. Ĉiuj dentgrincigis kun larmo.

La studentoj, kiuj respondecis pri propagando, eklaboris. Sur muroj, sur la tero kaj eĉ sur dorsoj ĉie estis plenaj de sloganoj: "Repagigu la sangan

S. J. Zee:

Potenco de Onidiro

*Patrino de saĝula filo
Sidis trankvile ĉe teksilo.
Iu, havanta saman nomon
Kiel la fil', mortigis homon.*

*Venis najbar' kun voĉo kria:
"Homon mortigis filo via!"
Sed la virino plene fidis
Je l' filo, aŭdis kaj nur ridis.*

*Alia nun alkuris ŝvite
Sciigi ŝin pri l' fila krimo,
Ankoraŭ restis ŝi laŭvide
Tute kvieta en animo.*

*Sed kiam ŝi ekvidis trian,
Subite kaptis ŝin teruro,
Navedon forĵetinte sian,
Ŝi tuj forsavis sin trans muro.*

Laŭ Kroniko de Militantaj Regnoj

La Sercanto de Perdita Spado

*Foje spado de iu vojaĝanto
Falis en fluon de sur la boato.
Tuj signis li entrance sur la rando
Por marki kie falis lia spado.
Kiam ĉe l' bordo la boato haltis,
Li senprokraste en riveron saltis
De l' lok' signita por relevi ĝin
El la ŝanĝema vasta akva sin'.
Ĉion ĉi faris li kvazaŭ laŭplane.
La rezultato? Kompreneble vane.*

*Iuj kroĉiĝas dogme al doktrino,
Aliaj faras ĉion laŭ rutino,
Malsamaj tempo, loko kaj kondiĉoj
Ne havas lokon en iliaj niĉoj.
Kun sola vest' por ĉia ajn klimato,
Ili forgesas ja la movon de boato.*

Laŭ Ljuŝi Ĉunkiŭ

ŝuldon!", "Ĉe aresto de unu studento, ĉiuj sekvu lin en la malliberejon!", "En Nankino oni okazigos la Nacian Kongreson, en Bejping oni murdas studentojn!"

La studentaj ordogardantoj tenis sin mano en mano por protekti siajn trupojn; kaj ankaŭ la policianoj sammaniere ĉirkaŭis niajn ordogardantojn por apartigi la civitanojn de la studentoj.

Baldaŭ alvenis la studentoj de la Medicina Fakultato de la Pekina Universitato kaj la granda brigado de studentoj, lektoroj kaj asistantoj de la nomita universitato el Ŝatan-kvartalo. Venis unu post aliaj ankaŭ la trupoj de la universitatoj Ĉin-franca, Ĉaŭjang, la Fervoja Kolegio kaj Agrikultura Fakultato de la Pekina Universitato. De okcidente venis pli ol 1500 studentoj de Kinghua-universitato kaj Janging-universitato. Ili piediris proksimume 15 kilometrojn de ekster la urbo kaj traboris du blokadajn liniojn por atingi la fiksitan lokon por prezenti postulon.

Posttagmeze oficiale formiĝis prezidantaro kaj okazis tuj antaŭ la enirejo de la Reziĉejo manifestacian amaskunvenon. En la kunveno la prezidantaro akceptis ĵurnalistojn enlandajn kaj eksterlandajn kaj akuzis la reakcian registaron pri ĝia senhomeca masakro de studentoj sub la ŝildo de konstituciigo. Rerezentantoj de la societo de profesoroj de la Bejping-a Instruista Universitato kaj reprezentantoj de societoj de la lektoroj kaj asistantoj de la Pekina Universitato, Kinghua-universitato kaj la Bejping-a Instruista Univeristato ĉiuj esprimis sian plenan subtenon al la postuloj de la studentoj kaj proklamis strikon de instruado.

Tiam Li Zongjen, la estro de la Reziĉejo estis en Nankino por ĉasi la prezidantecon de la Kuomintang-a registaro en ĝenerala elektado. Kaj Ĉen Giĉeng, la garnizona komandanto fortensis sin en la Okcidentan Monton jam en la mateno. Kun ni intertraktis nur unu sekretario de la komandejo. Li unuflanke petis instrukcion de Ĉen Giĉeng per telefono kaj aliflanke intertraktis kun nia prezidantaro. Je la duono post la sesa, li promesis transdoni la arestitajn studentojn al la policejo. Plene indigniĝis la studentoj kaj ili kriis: "Ne estas permesate al la ekzekutistoj ilin transdoni al aliaj ekzekutistoj!" Ili devas esti transdonitaj al la Hospitalo de Pekina Universitato!" Iuj laŭte kriis: "Sturmu internen!" Ĉiuj estis ekscitiĝintaj. Ankaŭ tiuj kiuj anatŭe sidis sur la tero, ĉiuj stariĝis. La prezidantaro studis la situacion de la batalo kaj petis ĉiujn esti trankvilaj. Ankaŭ la amaso iom post iom komprenis, ke se ili entrudi-

ĝus en la Reziĉejon, ili trafus en embarason, kaj tiel la amaso denove trankviliĝis.

Vesperiĝis. La prezidantaro decidis: "Ni ne foriros, se oni ne liberigos la arestitojn." En la lumo de stratlampoj la studentoj sinsekve manklakis, kantis kaj slogankriis unuj responde al aliaj. La voĉo "ni ne foriros, se oni ne liberigos la arestitojn" esprimis la decideman batalspiriton. Ĉiuj estis pretaj persiste tra la tuta nokto.

Duonon post la deknua meznokte, revenintaj delegitoj de la Bejping-a Instruista Universitato raportis, ke ili propraokule vidis, ke la arestitaj studentoj estas alsenditaj al la Hospitalo de la Pekina Universitato. La Reziĉejo konsentis ke la 12 studentoj de la Pekina Universitato, kiuj estis envicigitaj en la nigra listo, estas ne plu alvokotaj al la juĝa esploro. Nur tiam la studentoj reordigis siajn vicojn kaj marŝis returne al siaj lernejoj kantante.

En tiu tago de la naŭa matene ĝis la meznokto, pli ol 6,000 studentoj persistis ĝis la venko en la frosta aprila vento, ĉirkaŭate de politikaj spionoj, soldatoj kaj policianoj. En tion enversiĝis la forto de unuiĝo kies kerno estis la gvidado de la Partio.

Du tagojn poste la terurita malamiko rapidis organizi kontraŭatakon. Ili urĝeme kolektis bandon da homoj por fari t. n. "kontraŭkomunistan manifestacion", en kiu troviĝis civile vestitaj soldatoj, policianoj, ĝendarmoj kaj politikaj spionoj, inkluzive ankaŭ kelkiom da lernantoj el mezaj kaj elementaj lernejoj perforte envicigitaj. Alveninte antaŭ la Ruĝan Domon ili faris plej naŭzan insultadon kaj poste ankaŭ de-

Ĉe la Rivero Gialingiang

Skulptaĵo de Mo Ce



truis la loĝejon de la profesoroj en la orienta domo; fine ili foriris kaj horde kolektiĝis antaŭ la enirejo de la Rezidejo por ricevi sian porcion de kolbaso kaj pano. Sed tiu ĉi skandala epizodo fabrikita de Kuomintang-o nur kaŭzis ankoraŭ pli grandan indignon kaj pli grandskalan proteston kaj strikon ĉe profesoraj rondoj.

Ŝekve de la sinsekvaj venkoj de la Popola Liberiga Armeo, la vasta amaso en la altaj lernejoj kaj institutoj en Bejping heroe batalis sub la gvido de la Partio, kaj de tio efektiviĝis “kunfluo de la ses strikoj” (instruado, lernado, scienca esplorado, oficejaj laboroj, industriaj produktoj kaj kuracado). La bataloj sinsekvis unu post alia kvazaŭ seninterrompaj ondoj. Tio daŭris ĝis la fino de aprilo, kaj estis nomata en la regiono regata de Kuomintang-o “Aprila Ŝtormo”.

Aŭroro de la Venko

La “Aprila Ŝtormo” hardis kaj plivastigis niajn vicojn. Vastaj junaj studentoj fariĝis rapide revolucionemaj. En la batalo, la unueca fronto kontraŭ usona imperiismo kaj Ĉiang Kajŝek rapide ekspansiĝis. Pli kaj pli izoliĝis la malamiko.

Dum la “Aprila Ŝtormo” paralele kun decidema rebato kontraŭ la perforto de la malamiko, oni ankaŭ neniom neglektis la batalon sur ideologia fronto. Pere de la “Duonmonata Revuo de Pekina Universitato” kaj murgazetoj de diversaj societoj, oni senĉese senmaskigis la t. n. “trian vojon” kaj malkaŝis la reakcian fizionomion de la personoj post la kuliso. La hontkovran tukon — liberalismo — de Hu Ŝi, la kultura lakeo nro 1 de Usono kaj Ĉiang Kajŝek, estis forŝirita en

murgazetoj. Iu murgazeto faris por li kronikon, komencante de lia slogano “pli multe da studoj pri problemoj, kaj malplimulte da paroloj pri ismoj” ĝis la eldiroj, ke “Ĉinio povus rezisti Japanion nur post kvindek jaroj”, kaj “la okazintaĵo de Ŝen Ĉong* estas nur leĝa problemo. Per ĉio tio lia vera fizionomio estis plene malkaŝita. Alia murgazeto malkovris lian veran vizaĝon kontrastigante, ke li diris en la semestroinaŭgura soleno de la universitato, ke li ne komprenas politikon, nek interesiĝas pri politikaj aferoj, dume li tutan jaron sin okupis en la t. n. Nacia Kongreso por kapti forjetitan oston; plie ke li sin ŝajnigis prizorganto kaj protektanto de la studentoj, sed kiam tiuj estis persekutataj li diris, ke “lernejo ne estas koncesiita teritorio” ekster faŝista persekutado. Multaj studentoj fariĝis pli klarvidaj kaj forjetis iluzion pri li.

La subteraj partiaj organizoj lerte aplikis en la batalado la principon “agi kun praveco, kun profito kaj kun takto”. Kiam certa venko estis atingita en batalo oni tuj ĝin finis propra-iniciate. Unuflanke, oni plibone zorgis la organizadon de interligita defendo inter la instruistoj, studentoj kaj laborantoj interne de la lernejoj kaj inter diversaj lernejoj, por ke la amaso

* *Ŝen Ĉong, studentino de la Pekina Universitato, estis perfortita de usona soldato en decembro, 1946. Treege indignigite de tio, la gestudentoj tra tuta Ĉinio lanĉis en kelkdek grandaj urboj strikon kaj manifestaciojn kontraŭ la usona imperiismo kaj Ĉiang Kajŝek. Por flati la usonajn imperiistojn kaj Ĉiang Kajŝek-bandon, Hu Ŝi tute senhonte faris la cititan eldiron.*

(Daŭrigo sur 89p.)

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KU

Entuziasma Celebrado de la 11-a Datreveno de la Subskribo de “la Ĉini-Sovetunia Traktato de Amikeco, Alianco kaj Interhelpo”

Okaze de la 11-a datreveno de la Ĉini-Sovetunia Traktato de Amikeco, Alianco kaj Interhelpo, la ĉina popolo okazigis entuziasme amasajn kunvenojn en diversaj lokoj tra la tuta lando por celebri la grandan feston de solidareco inter la popoloj de Ĉinio kaj Sovetunio. La festokunvenon en nia ĉefurbo Pekino partoprenis pli ol dek mil popolanoj. Ĝin ĉeestis ĉefministro de la Ŝtata Konsilo kamarado Ĝoŭ Enlaj kaj aliaj gvidantaj kamaradoj de la Centra Regis-

taro, kaj ankaŭ delegitoj de ĉiuj demokratiaj partioj, popolaj organizoj, superaj generaloj de la Popola Liberiga Armeo kaj famuloj de diversaj rondoj de Pekino. Ĝin partoprenis ankaŭ kamarado S. V. Ĉervonenko, la ambasadoro de UŜSR kaj aliaj sovetuniaj amikoj kaj la delegitoj de diversaj socialismaj landoj kaj komunistaj kaj laboristaj partioj diverslandaj en Pekino, por kune celebri la feston kun la ĉina popolo. Kamarado Liaŭ Ĉengĝi, vicprezidanto de la Ĉini-Sovetunia Amikeca Asocio, montris ĉe la kunveno, ke la Ĉini-Sovetunia Traktato de Amikeco, Alianco kaj Interhelpo estas kristaliĝo de la amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Sovetunio, ke ĝi estas la

plej granda barikado kontraŭ ekiĝo de mondmilito fare de la imperiismoj por sklavigo de la tutmonda popolo, ke ĝi estas potenca fortikaĵo por konservo de mondpaco, ke ĝi estas la plej fidinda amiko de ĉiuj subpremataj nacioj kaj popoloj. Li diris, ke la registaroj de Ĉinio kaj Sovetunio konsekvence advokatas por la paca kunekzistado de landoj kun malsamaj socisistemoj, ke niaj landoj neniam invados eĉ colon da fremda teritorio kaj nek permesos al iu ajn invadon al nia sankta teritorio, ke la ĉina popolo ĉiam restos la plej fidela kaj plej fidinda amiko de la sovetunia popolo kia ajn incidento okazos en la mondo.

Ha, Ter-atestilo!

MIL blovkonkoj sonas kune kaj dekmil sonoriloj sonoras samtempe. Ĉimomente, saltas ĉiu ondo en la riveroj kaj kantas ĉiu pinarbo sur la neĝkovrita monto . . . Ha kia granda evento okazas sur nia stepo?

Kion tenas la maljunaj servutuloj en la manoj? Kion portas la maljunulinoj sur la kapoj? Ha, estas ter-atestiloj! La ter-atestiloj disdonitaj de la Asocio de Kamparanoj, de la Popola Registaro!

Ĉirkaŭe la ter-atestilo estas orname kadrita per buntaj koloroj tiel belaj kiel la koloraj nuboj. Sur la ter-atestilo estas skribitaj en la han-a kaj tibeta lingvoj la kvanto de la tero donita kaj la nomo de la posedanto; kaj en la centro sur la fono de la ruĝa standardo kvinstela estas presita la portreto de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, kvazaŭ leviĝanta suno dissendanta brilegajn radiojn! . . .

La grandioza demokratia reformo frakasis la damnindan servutan sistemon per nevenkebla ora hakilo kaj redonis la liberecon, bluan ĉielon, kantadon kaj teron al la servutuloj forskuintaj la katenojn. Trafoliumu la milojn da volumoj de la sutro en la Dargje-templo, kaj vi ne trovos paĝon da historio kia la hodiaŭa. Ha, tio estas la unua ĝojiga okazaĵo sur la stepo ekde la kreo de la mondo!

La servutuloj svarmas al la Asocio de Kamparanoj, kie flirtas maro da ruĝaj flagoj kaj sonas ĉiaj muzikinstrumentoj. La servutuloj svarmas al la Asocio de Kamparanoj kvazaŭ tajdo en marto aŭ densaj nuboj en septembro, kun ĉiu piedsigno pleniĝita je gaja rido. Ili iras tien por ricevi la plej altvaloran objekton dum sia vivo — la teron!

Rigardu! La maljuna servutulo Tongup estas balancanta sian blankharan kapon, kun vizaĝo striita de varmaj larmoj. Firme premante la novan ter-atestilon al sia sino, li fermas la okulojn ebrie. Aŭskultu! El la profundo de sia koro li eligas la jenajn vortojn: “Dankon al la Patro! Dankon al Prezidanto Maŭ! Mi scias ke ĉi tio ne estas sonĝo. . . .”

Rigardu! La maljuna avino Nima saltante krias kun la ter-atestilo en la manoj, kvazaŭ petolema infano legante ekstaze al ĉiu renkontito la orajn vortojn sur ĝi skribitajn: “Naŭ mu-oj da tero, tiuj naŭ kal-oj da tero apartenas al mi, kiujn nek la kapulo nek la tribestro povos forrabi plu! . . .” Ŝi ekridas levante la kapon. La suno prilumas la diafanajn larmgutojn kovrantajn ŝian vizaĝon. . . .

Rigardu! La blinda Topĝe estas palpanta la ter-atestilon per tremantaj manoj, kaj gravmiene kaj



Huj Jijan, la sekretario de Lhasa-Komitato de la Ĉina Komunista Partio, laboras kun la tibetaj kamparanoj.

Foto de Hinhua

malrapide disfaldas tiun ĉi susurantan paperon. Subite ekaperas miraklo. De liaj okuloj, kiujn maldiafanigis la turmentado de servuto kaj ter-rento dum la pasintaj dekoj da jaroj, momente radias ĝoja brilo! Poste li levas la ter-atestilon kaj longe ĝin fikse rigardas kaj rigardas. . . . Per ekscitita voĉo, kiun nur mem povas aŭdi, li demandas: “Karaj najbaroj! Kion mi vidas?! Ha?!” Fine li laŭte krias kvazaŭ subita ŝpruco de monttorento: “Mia ĉielo! Mi vidas, mi vidas Prezidanton Maŭ!”

Rigardu! La junaj servutuloj unue interbenas unu la alian salutante per kunmetitaj manoj kaj poste interfrapetas unu la alian intime, interŝanĝante, por neniu klare aŭdeblajn intermitajn parolojn. Sed, sur la tuta stepo vibras nun giganta sonondo: “Tero! Ni jam havas teron!”

Kia sceno ĝi estas! La servutuloj kun ter-atestiloj en la manoj interprete alkuras al la vastaj sekalkampoj kaj linkampoj sude kaj norde de la neĝ-monto. En ĉiu kampo el nigraj gemoj estas starigita ligna tabulo kun alligita katak-o, sur kiu estas skribita la nomo de la posedanto de tiu ĉi kampo. Kaj antaŭ la

demokratia reformo tiuj nomoj ja estis neforviŝeblaj skribitaj en la nomlistoj ĉe la mastrosinjoroj. Kompreneble Galpu restas Galpu kaj Ĝolma restas Ĝolma. La diferenco estas ke la hieraŭaj plebanoj jam fariĝas la hodiaŭaj mastroj!

Kion faras Sodnan? Jen, sin klininte li legas mallaŭte kaj fiere sian nomon sur la ligna tabulo, kvazaŭ li la unuan fojon havus nomon dum sia vivo. Kion faras Ĝaŝi? Rigardu! Li genufleksas kaj serioze suprenlevas manplenon da tero, kiun li flaras kaj flaras, kaj kun feliĉaj fermitaj okuloj metas sur siajn dikajn lipojn kaj kisas. Kion faras Lotan? Li kaptas olebrilan terbulon kaj rideksplodas: "Ha, ha, ha," kvazaŭ li levus mason da oro. Hej! Kion faras tiuj junaj servutuloj? Ili postkuras unu alian, interpuŝas, ridas kaj ruliĝas sur la tero. . . .

Efektive, efektive, la tero, kiun la servutuloj akvumis generacion post generacio, per siaj bolante varma sango kaj diafana ŝvito, finfine revenas hodiaŭ en la manojn de la unua generacio de liberuloj. La tero, la floranta tero, la oleon gutigonta fekunda tero, la banata en socialisma sunlumo tero, dissendas hodiaŭ blovon post blovo da ebriiga aromo kiun povas percepti nur la servutuloj, kaj malfermas sian sinon tiel vastan kiel la ĉielo por ĉirkaŭpreni siajn mastrojn, kiuj jam frakasis la katenojn kaj entombigis la mizeron!

Rigardu! En la dikaj manoj de miloj da servutuloj estas tenataj la ter-atestiloj disjetantaj orbrilon. Rigardu! La fortaj piedoj de miloj da servutuloj fluge paŝas al la perspektivo komunisma. La malbeninda servuta sistemo estas detruita, ĝia homman-



Ĝoje ricevas la teratestilon la 76-jara Kesongĉima, forskuinta servuton en la vilaĝo Cajgongtang de la orienta distrikto de Lhasa. Foto de Hinhua

ĝanta kodo abolita, la krulegaj torturiloj dispecigitaj kaj la dikaj servutulaj nomlistoj forbruligitaj. Majeste stariĝas nun dignoplena klaso antaŭ la granda portreto de Prezidanto Maŭ!

Morgaŭ, sur tiu ĉi floranta tero plene de starigitaj lignaj tabuloj, susuros kaj ruliĝos ondantaj oraj tritikspikoj! Leviĝos miloj da mirakloj kune kun la suno! Morgaŭ, el la paŝsignoj postlasitaj de la servutuloj naskiĝos giganta olerafinejo, brilanta hidroelektra stacio, kolosaj altfornoj. . . . ! La tibeta popolo, kune kun la popolo de la tuta lando, paŝos fulmorpide la vojon de dudek jaroj en unu tago!

La teratestilojn ricevintaj kamparanoj ĝojkrias: Vivu Kompartio! Vivu Prezidanto Maŭ!

Foto de Hinhua





MAŬ ZEDONG

PRI
PRAKTIKO

Mendu Tuj

ĉe

niaj perantoj aŭ nia administracio
(adr: P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio)

JARKOLEKTOJ DE EPĈ

1959 kaj 1960

Malmulte da jarkolektoj de El Popola Ĉinio de lastaj du jaroj estas ankoraŭ haveblaj ĉe nia administracio.

Prezo egalas al jarabono (1959: laktole bindita;
1960: broŝurita)

=====
Kolonelo Vicarmeestro Jan Venbin:

Unu Taso da Bakita Faruno

JA vere mankas taŭgaj vortoj por priskribi la malfacilegan vivon dum la Longa Marŝo! Kvankam tio okazis antaŭ jam pli ol dudek jaroj, tamen mi ankoraŭ klare memoras pri la malfacile eltenebla vivo de nia Dua Roto de la 51-a Regimento de la 17-a Divizio de la Sesa Korpuso de la Duaflanka Armeo dum la traŭro de la Marĉa Herbejo en marto, 1935.

Ĝi estis la plej malfacila parto de la 25,000-lia Longa Marŝo. Tie ne loĝis homoj, ne ekzistis domoj kaj apenaŭ aŭdiĝis eĉ birdaj pepoj. Ĝis la horizonto ni vidis nur grizajn nubojn, grizajn herbojn kaj ŝliman marĉon kun putriĝintaj herboj. Ĉiutage niaj piedoj pene treniĝis antaŭen tra la marĉa herbejo enfaligema, malseka kaj glitiga. Tia piedirado ankoraŭ ne estis tiom supermalfacila por ni, kiuj jam surgrimpis la altan kelkmilmetran Giagin-monton neĝkovritan tutjare kaj transpasis la naturan dangeregan strategian pasejon de Ginsa-rivero; tamen malfeliĉe estis, ke niaj stomakoj estis dume malplenaj, ke grenon ni jam ne vidis delonge kaj forkonsumitaj estis eĉ

la sekigitaj sovaĝaj legomoj. Antaŭ kelka tempo, la korpusestro buĉigis sian ĉevalon kaj distribuis al ni ĝian viandon, sed nun eĉ peco da ĉevalosto aŭ ĉevalhaŭto fariĝis rara frandaĵo. Sed por pli rapide kuniĝi kun la ĉeffortoj de la Centra Ruĝa Armeo kaj marŝi norden por kontraŭbatali la japanajn invadantojn, niaj batalantoj ankoraŭ antaŭen marŝis persisteme, silente trenante la pezajn piedojn kaj kun plej granda eltenemo elportis la suferojn kiujn kaŭzis al ili ĉiu farita paŝo. Tiuj, kiuj jam plene elĉerpiĝis kaj kiujn la kamaradoj ankaŭ bedaŭrinde ne povis helpi, falis senplende kaj finis sian vivon en gloro.

Tiam mi estis sekretario de la partia filio kaj samtempe ankaŭ plotonestro. En la komenco, mi ankoraŭ min streĉis por kuraĝigi la kamaradojn venki la malfacilojn, sed iom post iom elĉerpiĝis ankaŭ mia energio. Iun tagon, mi eĉ ne plu povis levi la piedojn. Je la ekmarŝo, du kamaradoj min subtenis helpe, sed poste mi trovis, ke ankaŭ ili estas ne en pli bona stato, kaj daŭrigo de la klopodado nur ruinigos nin ĉiujn tri, mi do faris ĉion por apartigi min de ili.

Mi diris, ke mi povas mem iri sen ilia helpo. Sekve mi postlasiĝis. Tiu ĉi mia aserto estis nur por trompi la du bonkorajn kamaradojn kaj ankaŭ min mem. La fakto montris, ke mi jam kolapsiĝis post nur kelkaj paŝoj. La kapo kvazaŭ ŝveliĝis grandega, en la okuloj dancadis densaj oraj steloj, la kruroj moliĝis kiel vermiĉeloj; mi falis ŝanceliĝante sur marĉoherbejon kaj senkonsciiĝis. Kiam mi iom rekonsciiĝis, mi pensis: Jen venas al mi la fino, mi ne povos atingi la cellokon kune kun la kamaradoj. . . .

Mi restis duonsvena dum tre longa tempo, kaj kiam mi refoje malfermis miajn okulojn por vidi la mondon, subite mi trovis antaŭ mi kamaradon kun aĝo de pli ol 30 jaroj, velkintan kaj elĉerpitan neniom malpli ol mi, kaj ĉagrene min rigardantan.

“Kio? Malsaniĝos?”

“Ne,” mi ekridetis amare, “. . . dum du tagoj . . . mi nenion manĝis. Mi ne povas paŝi. . .” Mi klopodis tutforte laŭtigi mian voĉon por komprenigi al li mian staton.

“Ho! Tiel estas.” Li urĝeme ekklinis sian kapon, malligis sian jam pli ol duone malplenigitan rizo-saketon kaj elverŝis el ĝi tason da orflava bakita faruno. Kiel bona faruno bakita! Ĝia bonodoro vigligis mian flarsenton, kaj mi dezirus tuj ekpreni manplenon por manĝegi; sed kiam mi rimarkis, ke la sako estas preskaŭ jam malplena, alia sento devigis min diri la jenon: “Ankaŭ vi devas marŝadi, kiel do mi povas forpreni de vi la nuran malmulton da nutraĵo?”

Li eklarmis je tio kaj diris al mi en riproĉeta tono:

“Kamarado, en tiel malbona stato vi jam troviĝas, kaj vi ankoraŭ volas vin teni en tia hardeco! Unue ĝin manĝu, mi ja ne povas lasi mian kamaradon malsatmorti antaŭ miaj okuloj.”

Ankaŭ mi eklarmis, eklarmis de kortuŝiĝo. Ĉe la momento mi ne sciis kion diri. Mi deprenis la plurjare portitan orringon de sur mia fingro por donaci al li kiel memorajon. Li rifuzis serioze.

“Por klasfratoj tio ne necesas. Ĉu mi dezirus, ke vi rekompencu min? Jam ĝin resurmetu, mia bona kamarado!”

Tion dirante li ĉerpis tason da klara akvo el sulkajo kaj ĝin metis antaŭ min kun la bakita faruno, kaj dume li min atentigis ripete: Ne estu urĝema, prenu la manĝon malrapide. Post la manĝo, mi vigliĝis iom post iom, kaj sentis forton ankaŭ ĉe la kruroj. En la komenco, li min subtenis dum sufiĉe longa vojo, timante ke mi estas tro malforta. En la sekvinta tago, mi sukcesis atingi la trupon kaj venis al loko enloĝata de homoj.

Mi tre bedaŭras, ke mi eĉ forgesis demandi lin pri lia nomo pro emociiĝo kaj ekscitiĝo. Sed mi scias, ke li estas ruĝarmeano, unu el la miloj kaj miloj da ruĝarmeanoj. Tre tre multaj estas tiaj kamaradoj, kia li, en nia revolucia armeo. Tia estas la propra karakterizaĵo de la proletaj trupoj. Kaj ni venkis la malamikojn ĝuste dank’ al tia klasfrata solidareco de interhelpado kaj unuanima kunagado.

Ruĝarmeanoj Trairas la Marĉa Herbejon.

Olepentraĵo de Liu Lun



Ĉevalkapa Liuto*

(Mongola popolrakonto)



ONI diras, ke la ĉevalkapa liuto estis farita plej frue de Suhe, malgranda paŝtisto sur stepo de Ĉahar. Suhe elkreskis sub la vartado de sia maljuna avino. La avino kaj nepo vivtenis sin per paŝtado de nur dudek-kelkaj ŝafoj. Ĉiutage Suhe iris paŝti la ŝafojn kaj matene kaj vespere helpis al sia avino en preparado de manĝaĵoj. Estante deksepjara Suhe jam aspektis tute kiel plenaĝulo. Li havis ankaŭ neordinaran talenton kantistan. La paŝtistoj, kiuj loĝis proksime, tre ŝatis aŭskulti lian kantadon.

Iutage, la suno jam subiris malantaŭ la montaron kaj la ĉielo pli kaj pli mallumiĝis. Sed ankoraŭ ne revenis hejmen Suhe. Ne nur maltrankviliĝis lia avino, sed iom ankaŭ la najbaraj paŝtistoj. Ĝuste en tiu momento, kiam ĉiuj senpacientiĝis, en la mongolan tendon eniris Suhe, kiu portis en siaj brakoj iun lanugan blankaĵon. Kiam la ĉeestantoj ĉirkaŭis lin, ili trovis, ke estas ĵus naskita ĉevalido.

Rimarkinte ilian mirigitan rigardon, Suhe diris al ili kun rideto:


“Hejmen revenante, mi trovis survoje tiun ĉi etulon moviĝantan kuŝante sur la tero. Rimarkinte, ke neniu ĝin zorgas, nek ĉeestas la ĉevalpatrino, kaj timante, ke en la malluma nokto lupoj ĝin formanĝos, mi prenas ĝin hejmen.”

Tagoj forpasis unu post la alia. La blanka ĉevalido elkreskis sub la atenta zorgo de Suhe. Ĝi estis neĝblanka sur la tuta korpo, bela kaj forta, kaj estis ŝatata de ĉiuj, kiuj ĝin vidis. Precipe Suhe plej forte ĝin amis.

En iu nokto Suhe estis vekita el sonĝo de urĝa ĉevalblekado. Li tuj ekmemoris la blankan ĉevaleton kaj rapide ellitiĝis. Tuj elirinte el la tendo, li aŭdis ankaŭ la blekadon de la timigitaj ŝafoj en la stalo. Li explore rigardis atenteme kaj ekvidis, ke unu granda griza lupoj volas sin ĵeti al la ŝafoj, sed la blanka ĉevaleto ĝin baras. Forpelinte la lupon jen li rimarkis, ke la tuta korpo de la blanka ĉevaleto estas malsekigita de ŝvito, el tio li ekkomprenis, ke la granda griza lupoj atakis la ŝafojn jam dum longa tempo. Nur

dank’ al la blanka ĉevaleto, liaj ŝafoj estas savitaj el danĝero. Li ameme karesis la malsekan ŝvitkovritan korpon de la blanka ĉevaleto kaj diris al ĝi kvazaŭ al intimo:

“Ho, blanka ĉevaleto, mi multe ŝuldas al vi! . . .”



De tiam Suhe kaj la blanka ĉevaleto, kvazaŭ du bonaj amikoj, ne povis forlasi unu la alian eĉ por mallonga momento.

Rapide forfluis la tempo. Iun printempon sur la stepo ĉirkaŭiris la novaĵo, ke la princo okazigos rajdkonkurson ĉe la lamaa templo, ĉar li volas elekti la plej bonan rajdiston kiel la edzon de sia filino. Do, kiu okupos la unuan lokon en la konkurso, ricevos lian filinon kiel edzinon. Pri tio informiĝis ankaŭ Suhe, kiun liaj amikoj instigis partopreni kun la blanka ĉevaleto. Tiel, Suhe ekiris kun sia amata blanka ĉevaleto.

Komenciĝis la rajdkonkurso. Multaj fortaj junuloj galopigis la ĉevalojn rapidege svingante sian vipon. Tamen, la finon atingis la unua la blanka ĉevalo de Suhe.

Tiam ordonis la princo: “Venigu la rajdanton de la blanka ĉevalo tien ĉi sur la terason.”

Kiam Suhe venis sur la terason, la princo trovis, ke la gajninto de la unua loko en la konkurso, estas

ja nur malriĉa paŝtisto, tial anstataŭ paroli pri la geedzigo, li diris ruze:

“Mi donos al vi tri arĝentajn ingotojn por via ĉevalo, ĝin lasu ĉi tie kaj hejmeniru!”

Aŭdinte la vortojn de la princo Suhe tuj indigniĝis, kaj pensante, ĉu mi povus forvendi mian blankan ĉevalon, li respondis tute senhezite:

“Mi venis ja por partopreni la rajdkonkurson, sed ne por vendi mian ĉevalon!”

“Ĉu vi, mizera paŝtisto, kuraĝas malobei min, la princon? He, venu, solide skurĝu tiun ĉi malriĉulaĉon.”

Ne atendinte la findiron de la ordono, la skurĝistoj jam komencis la batadon.

Suhe estis batita ĝis sveno kaj eĉ ĵetita de sur la teraso. Forrabinte la blankan ĉevalon, la princo reiris al sia palaco parade.

Poste, Suhe estis reportita hejmen de la parencoj kaj amikoj. Sub la zorga flegado de la avino, li resaniĝis iom post iom post kelkaj tagoj.

Iun nokton, ĝuste kiam li volis kuŝiĝi por dormi, subite aŭdiĝis bruo sur la pordo. Li ekdemandis, sed neniu respondis ekstere. Tamen la bruo ĉe la pordo daŭris. La maljuna avino malfermis la pordon kaj tuj ekkriis:

“Ho, estas la blanka ĉevalo!”

Aŭdinte la ekkrion Suhe elkuris rapide. Estis vere, ke la blanka ĉevalo revenis. Ĝi estis trafita per sep, ok akraj sagoj, kaj de sur ĝia korpo fluadis ŝvito.

Kunpremante la dentojn kaj portante doloron en la koro, Suhe eltiris la sagojn de sur ĝia korpo, kaj sango fluis el la sagvundoj. Pro la tro grava vundo, la ĉevalo mortis la sekvintan tagon.

La afero okazis jene: La princo tre ĝojis, kiam li akiris la bonan ĉevalon, kaj li elektis iun feliĉigan kaj bonan daton por aranĝi festenon kaj festis kune kun siaj parencoj kaj amikoj. Krome, li deziris ankaŭ montri al ili sian bonan ĉevalon kaj ordonis al siaj kavaliroj alkonduki ĝin posttagmeze tiun tagon.



Grava Atentigo

Pro rapida kreskado de la laboroj de la administrado de niaj eldonaĵoj ni estas devigitaj ekde la kuranta jaro fondi apartan **administracion** kun aparta adreso **P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio**. Dume nia redakcio kaj la estraro de nia Ligo restas ĉe la malnova adreso. Por ke la granda amaso da leteroj estu traktataj ĝusttempe, ni do petas ĉiujn niajn amikojn, legantojn, perantojn kaj kunlaborantojn ĉiam distingi la du malsamajn adresojn, kiam vi skribas al ni, ke se via letero temas pri libromendado, gazetabonoj, adresosanoĝoj kaj ĉiuj tiaj problemoj, vi nepre skribu aparte al la **Administracio**; sed pri demandoj redaktaj aŭ ĝeneralaj al nia Ligo skribu laŭ la malnova adreso de la redakcio.

La Red. de EPĈ.

La princo surrajdis la ĉevalon, sed antaŭ ol li firme sidis sur ĝi, subite la ĉevalo eksaltis forte per la postaj kruroj forjetante la princon surteren. Kaj perforte forskuinte la bridon, la blanka ĉevalo trakturis la homamason kaj forgalopis fluge. La princo leviĝis de la tero kaj ekkriis laŭte:

“Kaptu ĝin! Se neble, mortpafu ĝin!”

La sagoj de la pafistoj flugis al la blanka ĉevalo kvazaŭ pluvo dum uragano, malgraŭ tio la blanka ĉevalo tamen revenis hejmen kaj mortis antaŭ sia plej amata mastro.

La morto de la blanka ĉevalo kaŭzis al Suhe pli grandan malĝojon kaj indignon. Pro tio li ne povis endormiĝi por kelkaj noktoj. Iun nokton, Suhe songiĝis, ke la blanka ĉevalo ree vivas. Li karesas ĝin kaj ankaŭ la ĉevalo alproksimiĝas al li, mallaŭte dirante:


“Mastro, ĉu vi ne povas elpensi ian rimedon por ke mi neniam disiĝu de vi kaj servu por forigi vian enuon? Faru liuton per miaj tendenoj kaj ostoj.”

Kiam Suhe vekiĝis, li faris liuton per ĝiaj ostoj, tendenoj kaj vostharoj laŭ la konsilo de la ĉevalo.

Ĉiufoje, kiam li ludis la liuton, li ekmemoris sian malamon kontraŭ la princo, kaj sian ekscititan animstaton dum rapida kurado sur la ĉevalo, tiam pli bele sonis la liuto.

De tiu ĉi tempo, ĉevalkapa liuto fariĝis konsolo de la paŝtistoj sur la stepo. Aŭskultante la belan sonon de la liuto, ili forgesas la lacecon de la tago, kaj longe, longe ne volas foriri.

* Ĉevalkapa liuto estas populara korda muzikilo inter mongolaj paŝtistoj. Sur ties kolono estas skulptita ĉevala kapo.



Je la 10-a, jul. 1960 en Havana okazis grandioza kunveno kun 500,000 partoprenantoj kontraŭ la interveno de Usono.



Milicianinoj

Terkulturistoj, konfiskantaj la teron de la usona Unuigita Frukta Kompanio, ĝojkrias: Ni rebatos la malamikojn per niaj hakiloj.



Deng Gang:

Venko Apartenas

“**B**ATALANTA KUBO” ne estas ordinara dokumenta filmo, sed himno de revolucio. Tio, kion ĝi surekranigas, estas unu el la plej gravaj historiaj okazintaĵoj de la nuna epoko: Unu malgranda insula lando, kun distanco je nur 90 marmejloj de Usono, kaj kun loĝantaro de nur 6,500,000 homoj, travivinte malhonoron kaj mizeron dum pli ol kvar jarcentoj, finfine akiris siajn liberecon kaj sendependecon tra la vojo de armita batalo de la popolo. Batalanta Kubo estas brila ekzemplo. La signifo de la filmo kuŝas en tio, ke ĝi prezentas al la spektantoj tiun ĉi ege altvaloran historian dokumenton, kaj dank’ al tio oni pli certigas, ke en nia epoko, la plena disfalo de koloniismo estas neevitebla.

Koloniismaj landoj neniam favoros popolojn de kolonioj per donaco de libereco, ankaŭ neniam memvole forlasos la landojn de ili ekspluatatajn. En Kubo, imperiistoj subtenis sian kolonian regadon per sanga buĉado. Kiam foriris unu kruela koloniisto, enrudigis tuj alia ankoraŭ pli kruela kaj feroĉa. Kaŭze de tio sango ruĝigis la teron de Kubo. Kubo estas lando, kiu neniam estis libera, sed ankaŭ neniam ĉesis batali por la libereco. La suferado dum centoj da jaroj multon instruis al kuba popolo. Ili komprenas, ke vizaĝe al la kontraŭrevolucia perforta regado armita ĝis la dentoj, demeti armilon signifas morton; ke oni devas uzi perforton kontraŭ perforto; kaj ke por akiri la venkon, oni devas sin apogi nur al firma batalado.

Jam pasis la mallumaj jaroj, la venkinta kuba popolo starigis, kaj batalas pli brave.

Ceremonio de transprenado de la usona Sinclair Olea Kompanio



al la Revolucia Kuba Popolo!

Vidu, usonaj aeroplanoj faras krime brulegon en urboj kaj sukerkanaj kampoj de Kubo, sed, ĝuste tio bruligis ankaŭ la pli indignan revolucionan flamon en la koroj de kuba popolo. Ili rigore rebatas la usonajn rabistojn, kaj faligis aeroplanon de usonaj rabistoj.

Vidu, kun larĝanda pajlĉapelo sur la kapo kaj kun glavo kaj standardo en la manoj, la kubaj kamparanoj ĝojplene venas sur galopantaj ĉevaloj. Nun ili jam ricevis terposedan diplomon de la registaro, kaj fariĝis denove mastroj de la tero. Ĉar jam estas ŝtatigitaj la vastaj kampoj, kiujn la usona Unuigita Fruktakompanio okupis de antaŭ 60 jaroj.

Vidu, la heroa kuba popolo per la plej firmaj revolucionaj elpaŝoj rebatas la intrigojn kaj provokojn de la usona imperiismo. La elektrokompanioj, petrolkompanioj kaj sukerfabrikoj, kiuj apartenis al usonaj entreprenoj, ĉiuj estas ŝtatigitaj unu post alia, inkluzive la kuban filion de usona Banko de Novjorko. Sur konstruaĵoj de tiuj ĉi entreprenoj leviĝas la majestaciaj standardoj de Kubo. La tagoj de sklavigo de Kubo fare de la usona imperiismo jam forpasis por ĉiam.

Vidu, jen kuba laboristo per lako serioze forŝmiras la ŝildon de usona Sinclair Olea Kompanio. Oni kolere forjetas la blazonŝildojn de usonaj petrolfabrikoj Esso kaj Texaco sur la teron kaj ilin frakasis. Oni okazigas entombigan ceremonion por la konfiskitaj usonaj kompanioj. La ĉerkoj simbolantaj 26 usonajn kompaniojn kaj 36 usonajn sukerfabrikojn estas ĵetitaj en maron. Oni volas entombigi en la marfundon ĉi tiujn usonajn monopolajn kapitalojn, kiuj suĉis la sangon kaj ŝviton de la kuba popolo, lasante al ili neniun colon da tero por stari en Kubo.

Vidu, por prepari reziston kontraŭ la kaŝe preparata atako de la usona imperiismo, la kubaj milicianoj sin ekzercas tage kaj nokte. Ili firme kredas, ke se la usonaj imperiistoj kuraĝus entrudiĝi, estas sufiĉe da tero en Kubo por enterigi ĉi tiujn invadantojn. Kubo nepre venkos.

Dank' al la filmo niaj spektantoj kvazaŭ mem alvenus al la bela kaj riĉa lando Kubo. Liberiginta Kubo estas en konstruado. Sur la tero ĵus ŝtatigita hieraŭ, komenĉiĝas jam la agrara reformo hodiaŭ kaj plie organiziĝas miloj da kooperativoj. La fondo de propra nacia industrio, estas preparata de la kuba popolo kaj disvolviĝas ankaŭ poliagrikulturo, por ke la lando povu sin provizi mem per grenoj kaj legomoj.

En la revolucia Kubo, la popola vivnivelo pliboniĝas kaj plialtiĝas tagon post tago. Ĉu en urboj, ĉu en vilaĝoj, multaj lernejoj kaj loĝejoj estas konstruitaj. Kiel brila sin montras Kubo sub la suno de sendependeco kaj libereco!

En nia granda epoko, la kuba revolucio estas tute ne izolita. La voĉo "Kubo jes, jankioj ne!" sonas tra la tuta Latinameriko. La socialismaj landoj estas la plej sinceraj kaj la plej fidelaj amikoj de la kuba popolo, 650-miliona ĉina popolo eterne staros kune kun la kuba popolo. La Ĉina Artatrupo kaj Ĉina Komerca Delegacio kunportantaj la profundan amikecon de la ĉina popolo vizitis Kubon unu post la alia. La filmo "Batalanta Kubo" estas kristaliĝo de la amikeco inter ĉina kaj kuba popoloj. Mi profunde kredas, ke sin apogante sur sia propra forto kaj sur la subteno de la internaciaj fortoj progresemaj kaj pacamaj, la kuba popolo certe povos daŭre puŝi la revolucion ĉiam pli antaŭen!

Venko apartenas al la revolucia kuba popolo!

(Daŭrigo de 81p.)

estu strikte unuigita ĉirkaŭ la Partio kaj povanta aktive rebati ĉiam ajn la persekuton de la malamiko. Aliflanke, por altigi la konscion de la amaso, estis intensigita la memedukado de la amaso per la intimaj kunsidoj de la instruistoj, studentoj, lernejoj, laborantoj kaj lernejoj, gardistoj, prelegkunvenoj de profesoroj kaj diversaj kunsidoj pri aktualaj problemoj en ĉiuj fakultatoj kaj klasoj, organizitaj pere de publikaj organizaĵoj. Iom post iom konsciĝis la studentoj en la movado, amase petis aliĝon al la Partio kaj ĝiaj eksteraj organizoj kaj pogrupe iris al la Liberigita Regiono.

Ne longe poste, la heroa Popola Liberiga Armeo liberigis unun post la alia mezajn kaj grandajn urbojn. La liberigo de Bejping estis tuj venonta. Tiam la Partio gvidis, plie, ĉiujn en la universitato en la batalo kontraŭ la translokiĝo de la universitato al la sudo kaj en diversaj preparoj por la liberigo de la urbo. En tiuj tagoj, la pamfletoj pri la partiaj politikoj pri la urbo, intelektulo, industrio kaj komerco, kiujn presis la subteraj presejoj de nia Partio jam cirkulis tra la tuta universitato. La briloj de la fina venko jam prilumis la Ruĝan Domon kaj la Demokratian Placon.

Ekspozicio de Laborista Arto

LI ol sescent pentraĵoj, desegnaĵoj kaj aliaj artaĵoj libertempe faritaj de laboristoj tra la tuta lando estis ekspozitaj antaŭ nelonge en la Kultuta Palaco de la Laboranta Popolo en Pekino. Ili reflektis la energian spiriton de la ĉina laboranta popolo en la granda antaŭensalto.

En la komenca parto de la ekspozicio montriĝis granda nombro da vivecaj bone pentritaj afiŝoj. Aplikante vivecajn figurojn por esprimi la gvidon de la Komunista Partio, ili ĵetis fortan lumon sur la ĉefan direkton de la hodiaŭa strebado de la popolo. "La Feliĉo de la Ĉina Popolo" estas la titolo elektita de iu laboristo de Tajjuan por bildo pri Prezidanto Maŭ Zedong, kies plena fido kaj altaj idealoj estas fonto de inspiro tra la periodoj de la ĉina demokratia kaj socialisma revolucio kaj en ĝia socialisma konstruado. La politiko de la Partio konstrui socialismon je alta rapideco estis prezentita per figuroj de flugantaj ĉevaloj aŭ giganta drako fulme trapasanta la ĉielon.

Preskaŭ ĉiu bildo estis saturita de varmo kaj vivo. Grandega ĉinstila pentraĵo kune verkita de du ŝanhajaj ŝtallaboristoj montris grupon da homoj antaŭ la fornego en la streĉaj momentoj antaŭ ŝtalelverŝo. Du malpli grandaj bildoj, unu en tradicia stilo kaj la alia lignogravuraĵo, montris kun sama forto la heroan spiriton de homoj riparantaj telegrafajn liniojn dum ŝtormo. Nur tiuj, kiuj travivis la aktualan batalon povis kapti tiujn streĉajn kaj dramecajn okazajojn kaj doni al ili daŭran kaj kortuŝan formon.

Inter la verkoj pri la movado de teknika renovigo kaj teknika revolucio, sin trovis kelkaj en tradicia ĉina inko kaj koloro, kiuj, kvankam kvietaj en tono, tamen perfekte esprimis la sindonan, studeman kaj laboreman spiriton de la laboristoj. Estas malfacile kredi, ke tia profundo de sento povis deveni de io alia ol persona sperto. En "La Partia Sekretario Atakas la Ŝlosilan Problemon ĉe la Fornego", la sekretario estas sin klinanta super maŝino, diskutanta kun kelkaj laboristoj kiel plibonigi ĝian funkciadon; en "Jen Kie Kuŝas la Ĝenajo!" — juna laboristo kliniĝanta super tornilo ekridetas kontente. Rekreative artoplene, ĉi tiuj ĉiutagaj scenoj de la viglamova teknika revolucio, kiu envolas la tutan landon, frapas la rigardantojn per novaj forto kaj senco.

Multaj ekspoziciaĵoj prenis kiel sian temon la respondon de la laboristoj al la alvoko de la Partio subteni agrikulturon. Kelkaj esprimis la decidemon de tiuj kiuj iris al la agrikultura fronto; kelkaj montris, kiel ili rapidigis la produkton de terkulturiloj; kelkaj, kiel ili instruis siajn terkulturistajn fratojn manipuli kaj flegi maŝinojn. Ankoraŭ pli signifaj estis tiuj kiuj montras la intiman amikecon inter laboristoj kaj kamparanoj, kiu elkreskis el ilia batalo por komuna afero. Unu ekzemplo pri tio estas lignogravuraĵo de du infanoj rajdantaj sur la dorso de bovo rigardantaj al malproksima trajno ŝarĝita per traktoj. Unu infano diras al la alia: "Ili estas por nia komunumo"; ĉi tiuj vortoj formis la titolon de la verko.

Batalo por Ŝtalo

Ĉinstila pentraĵo de Du Giakin k Lu Jifei





Riparo en Ŝtormo

Skulptaĵo de Lu Jifej k Lu Hianlin

Bonaj ekzemploj de la dekoracia stilo estis montritaj en bildpanela kvaro (du el ĝiaj pecoj aperis sur la dorsa kovrilo de EPC n-ro 1). La vivecaj koloroj, la perspektivo uzata en ĉinaj pentrajruloj, maniero en kiu natura pejzaĝo, domoj, homoj kaj animaloj estas pentritaj kaj aranĝitaj, ĉiuj estas familiaraj teknikaj trajtoj de tradiciaj novjaraj bildoj. Tamen la artisto, asistanta lokomotiv-kondukisto el Liaŭning-provinco, sukcesis krei la ĝojan atmosferon de intima kunhelpo inter fabrikoj kaj kamparaj popolkomunumoj. Ĝuste tiel same estis kiam aliaj artaj

formoj estis aplikitaj. En la malnova tempo, ĉinaj pentraĵoj estis ofte disigitaj de la vivo. Hodiaŭ, en manoj de laboristoj, la peniko jam fariĝis potenca rimedo por esprimi diversajn aspektojn de ilia vivo same kiel iliajn aspirojn. Presitaj ikonoj de pordodioj, viditaj preskaŭ en ĉiu domo en la tagoj de feŭda socio, nature jam malaperis. Sed iu laboristo el Hupej-provinco, bone utiligis la malnovan formon, anstataŭigante la diojn per personigitaj figuroj de greno kaj ŝtalo — la du ĉefaj produktaĵoj sur kiuj dependas la progreso de la tuta ekonomio.

Papertranĉaĵoj estas ĝenerale tre malgrandaj en formato. Sed iu pekina artista grupo produktis unu longan je 3-4 metroj, kiu bildigis la viglegajn agadojn en urba popolkomunumo. Kapabli tiel disvolvi la novan el la malnova estas bona indiko de la laborista kreiva talento kaj matureco.

Sennombraj karikaturoj jetis interesan lumon sur la vivon de la laboristoj. Sed la elstara temo de la ekspozitaj karikaturoj estis la internaciisma spirito

Verdigu Virgajn kaj Kalvajn Montojn!

Skulptaĵo de Jan Jun-feng



montrita en tiuj traktantaj mondan politikon. Ili spiris fortan simpatian por la popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko batalantaj kontraŭ usona imperiismo. Unu konstrua laboristo en Pekino prezentis usonan imperiismon kiel boateton el unu sola lignopeco, balancatan sur la koleraj ondoj de la popolo.

Kompare kun la Unua Ekspozicio de Tutlanda Laborista Libertempa Arto okazigita en 1955, tiu de la jaro 1960 ekspozis duoble tiom da verkoj. Dum en 1955 la emfazo estis sur karikaturoj, ĉifoje sin trovis ekzemploj de preskaŭ ĉiu formo de belarto, inkluzive de grandaj skulptaĵoj. Laboristo-artistoj jam akiris altan teknikon, kaj speciale bonaj estis iliaj lignogravuraĵoj kaj ĉinstilaj pentraĵoj. Inter la artistoj,

kelkaj estis konataj, sed multaj el ili estis novaj, kaj multaj verkoj estis faritaj kolektive de libertempaj artistaj grupoj. Nun sin trovas ĉirkaŭ 19,800 tiaj grupoj kun 126,000 partoprenantoj en 23 provincoj kaj urboj. Nova kreskanta forto en nia laborista arto estiĝas kaj la socialisma arto en nia lando certe radios ankoraŭ pli brile en la estonteco.



KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KUR

Ĉio Jam Pretiĝos por la 26-a Tutmonda Ĉampionec-turniro de Tablotenis

La 26-a tutmonda ĉampionec-turniro de tablotenis okazos ĉi-jare en Pekino. La streĉa preparado por la turniro jam sukcese eniris sian finiĝan stadion. Por la ĉampionec-turniro konstruiĝis en Pekino speciala halego, en kiu povas okazi samtempe 10 maĉoj kaj sidi 15,000 spektantoj. Diversaj ekipaĵoj kaj necesajoj por la halo jam estas pretigitaj laŭ specialaj mendoj, kaj nun lastaj dekoraciaj tuŝoj por ĝin plibeligi estas streĉe farataj.

Diversaj afiŝoj, memorigaj insignoj, premiaj ordenoj kaj taso estis desegnitaj de pekinaj artistoj jam en 1959 laŭ peto de la organiza komitato, kaj nun post definitiva elektado oni jam transdonis la desegnaĵojn al metiartistoj por farado. Du el la afiŝoj jam estas presitaj kaj ekspeditaj al la gvidaj instancoj kaj membroasocioj en diversaj landoj de la Internacia Tablotenisa Federacio.

Grandnombro da Kadroj Helpas Agrikulturan Produktadon

Leviĝas alta tajdo de intensa laborado por agrikulturo inter la

kadroj de diverslokaj institucioj, entreprenoj kaj lernejoj responde al la alvoko de la registaro. Laŭ nekompleta statistiko en jenaj sep provincoj Hebej, Ŝanhi, Henan, Anhuj, Gianghi, Gujĝoŭ kaj Guangdong, jam 590,000 kadroj eklaboris en la kamparo. Inter ili multaj venas de gvidaj postenoj de la niveloj guberniaj aŭ superguberniaj. Plejparto el ili enradikiĝis en la produktaj grupoj kaj tie manĝas kune, loĝas kune, laboras kune kaj interkonsiliĝas kune kun la komunumanoj por solvi ĉiufanke la problemojn en produktado kaj vivado. Samtempe ili ĉiam laboras edife en postiĝintaj kaj malriĉaj produktaj grupoj kaj penas ŝanĝi la postiĝintan kaj malriĉan staton.

15-jara Ĉampiono de Ĉinŝako

La ĉampiono en la tutlanda turniro de la ĉinŝako en 1960 fariĝis 15-jara knabo Hu Ĵonghua, kiu ŝategas la ŝakludon jam de sia frua infanaĝo. Kiam li estis 13-jara, li akiris jam la ĉampionecon en la urba ŝakturniro de la lernantoj de ŝanhajaj elementaj lernejoj. Ekde tiam li havis ofte ŝancojn ŝakludi kun landfamaj ŝakistoj kaj ricevis de kelkaj el ili instruojn. Li distingiĝis en la ŝakludo per ofensivo kiel ĉefa taktiko, kaj tion li faras aŭdace,

lerte kaj trankvile. Fine en la tutlanda ŝakturniro de 1960 li venkis ĉiujn famajn ŝakistojn en la lando inkluzive la ĉampionon de 1959.

Japanaj Aktoroj Lernis Pekinan Operon en Ĉinio

S-ro Takase Sejiĉiro, aktoro de japana klasika teatraĵo *kabukio* kune kun 3 siaj kolegoj utiligante la okazon de la vizito de la Kabukia Trupo Zenzin (progresema) al Ĉinio lernis en Pekino faman teatraĵon *Arbaro de Aproj* de la pekina opero. En dekelkaj tagoj ili finis studon pri la dramo, prezentado kaj scenejaj artoj de la teatraĵo, inkluzive spaddancon de ĉina klasika luktarto, spiritstreĉigan prezentadon de glav-kontraŭ-glava batalado kaj la malfacilan arton de vizaĝ-pentraĵdesegnoj kaj kostumoj ktp. Dum la lernado tiuj 4 japanaj aktoroj spitis penegon kaj malfacilojn kaj ĉinaj aktoroj de la Kolegio de Ĉina Pekina Opero siavice senrezerve ilin helpis. Tia art-interfludo pli profundigis la fratan senton inter ĉinaj kaj japanaj teatraj laborantoj. Laŭdire, tiu ĉi teatraĵo baldaŭ prezentiĝos antaŭ la japana publiko en la formo de *kabukio* kaj sub la titolo *Devigita al Liangŝan*.

Dingbo Kaptis Fantomon

— Ĉina antikva rakonto el Lie Ji Ĉuan* —

Song Dingbo el Nanjang foje en sia junaĝo renkontis fantomon dum nokta irado.

“Kiu vi estas?” li demandis la fantomon.

“Mi estas fantomo, kaj vi?”

“Mi ankaŭ,” trompis lin Dingbo.

“Kien vi iras?” demandis la fantomo.

“Al la urbo.”

“Ankaŭ mi tien iras.” diris la fantomo. Kaj ili ekiris kune. Post kelkaj lioj**, la fantomo rekomencis: “Estas tro malrapide tiel iri. Ĉu estas bone, ke ni alterne portu unu la alian sur ŝultre?”

“Tre bone,” diris Dingbo. La fantomo do unue portis Dingbo-n sur la ŝultroj kaj marŝis kelkajn liojn. La fantomo ekdubis: “Vi estas tro peza. Ĉu vi eble ne estas fantomo?”

“Mi nove mortis, tial mia korpo estas peza.” ĝin trankviligis Dingbo kaj siavice ekportis sur siaj ŝultroj la fantomon, kiun li trovis tute sen pezo.

Post du aŭ tri alternoj, Dingbo demandis la fantomon: “Mi estas nova mortinto kaj ne scias — kion ja la fantomoj timas?”

“Nur la homan kraĉon,” respondis la fantomo. Kaj ili kune marŝadis plue. La vojo kondukis al rivereto. Dingbo petis, ke la fantomo transpasu unue. Li aŭskultis, sed neniu brueto estis aŭdebla. Kiam transpasis Dingbo mem, ekplaŭdis la akvo.

“Kial plaŭdas la akvo?” denove miris la fantomo.


“Estante nova fantomo, mi ankoraŭ ne alkutimiĝis al transpaso sur la akvo. Do ne miru pri tio,” diris Dingbo.

Kiam ili proksimiĝis al la urbo Nanjang, Dingbo ekportis la fantomon sur la kapo kaj firme lin prenis. La fantomo kriegis laŭte kaj petis delason. Sed Dingbo lin ne aŭskultis. Li iris rekte en la urbon, kaj kiam li demetis la fantomon sur la teron, tiu tuj transformiĝis en ŝafon. Li do ĝin vendis kaj por ke ĝi ne retransformiĝu kraĉis sur ĝin. Li forlasis la urbon ricevinte por la ŝafo 1,500 monerojn. Tiam Ŝi Ĉong† diris: “Fantomon Dingbo vendis, kaj mil kvincent monerojn li gajnis.”

* *Lie Ji Ĉuan (Rakontoj pri malordinaraj aferoj) verko el la tempo ĉirkaŭ la 3-a jarcento.*

***Lio: ½ kilometro.*

† *Ŝi Ĉong (249-300 p.K.) fama riĉulo en Ĝin-dinastio.*



Korespondi Deziras

* **8 kursaninoj ĉe Macario da Silveira**, Esperanto-Societo de Minas Gerais, c.p. (pk) 801, av. afonso pena, 952, s/402, Belo Horizonte, Brazilo, kun ges-anoj el Ĉinio, Persujo, Hindujo, Aŭstralio, Egiptujo, Malaja Insularo, Libano, Izraelo, Koreo, Indonezio k Konggo por interŝ. bk. k leterojn.

* **S-ro W. Samarasinghe**, “Esperanto” No. 141, Main Street, Bandara-wela, Cejlono.

* **Fukutaro Okano**, instruisto, Samukawa-tyo Koza-gun, Kanagawa-ken, Japanio, dk. serioze pri vivo de junulo kaj pentrarto.

* **Dr. Guido GARDELLI**, Boite Postale 2129, Tanger (Maroc), Nord-Afriko; dk. en E., rusa, franca, gemana, hispana, portugala k pola lingvoj k interŝ. stampitajn pm. sciojn pri scienco natura.

* **Interesatoj pri enĉambraj plantoj**, skribu al mi: kiujn plantojn vi kaj viaj konatuloj havas en ĉambroj? ĉu inter ili estas utilaj plantoj, de kiuj vi havas suplementan utilon? Ekzemple: ruĝa pimento, kuraca kacto-Aloe plantoj kontraŭ muŝoj, plantoj por konfitajo ktp. Se eblas, bonvolu aldoni ilustraĵojn. Mi nepre respondos per rakonto pri unu el utilaj enĉambraj plantoj. Adr: Gorazeev Vladimir, Opitnij uĉastok, Abonem. jaŝĉik N. 25, Magadan, Sovietunio.

* **Por Esperanta Ekspozicio en aŭgusto** ni petas alsendi ekzemple-rojn de ĵurnaloj kaj gazetoj naci-lingvaj, bildolibrojn por infanoj antaŭlernaĝaj, kaj popolajn pupojn kaj ludilojn. Ni nepre rekompencos per samvalora objekto. Adr: Ŭakamacu Esperanto-Societo, Nihonsekitanbunsekisho, Honmachi-3, WAKAMATSU, Fukuoka-ken, Japanio.

Ekstaru kaj Venku Mia Nigra Popolo!

La murdo de la imperiistoj al s-ro Patrice Lumumba, ĉefministro de Kongolando kaj aliaj kongolandaj patriotoj kaŭzis komunan indignon ĉe ĉiuj homoj honestaj kaj justamaj en la mondo. Estas tute kompreneble, ke post la morto de s-ro P. Lumumba la popoloj en diversaj landoj de la mondo amase kunvenis kaj manifestaciis por esprimi sian indignon kaj proteston. Tiel same indigniĝis pro tio ankaŭ niaj legantoj. Unu el ili, s-ro Jozefo Murjan el Izraelo, sendis al ni eĉ tradukon de la poemo de s-ro P. Lumumba por esprimi sian indignon, kondolencon al la morto de Ĉefministro P. Lumumba kaj plej korajn bondezirojn al la popolo de Kongolando, ke ĝi sub gvido de la instruo de s-ro P. Lumumba daŭrigu la bataladon kaj atingu la finan venkon. Estas nia devo ĝin publikigi kaj esprimi la saman senton.

La Red.

*Ho, mia amata nigra frato!
Dum jarmiloj vi vivis kiel besto arbara.
Viajn cindrojn disblovis ĉiufranken samumoj furiozaj.
Restis nur imponaj palacoj kaj piramidoj,
De vi konstruitaj el larmoj kaj sango por viaj tiranoj.*

*Pelita for de l' kabanombro dum persekutadoj,
Humiligita ĝis grundo per jugo, malbeno,
Disrompita en ĉiuj bataloj, kie venkis la forto,
Vi ĉiam lernis unusolan amaran devizon:
"Sklaveco aŭ morto!"*

*Vi serĉadis azilon en silento de labirintaj ĝangaloj,
Sed tie insidis vin mil aliaj mortoj—
Akradentaj rabobestoj, venenigaj serpentoj,
Profunda, densa marĉo, sufokanta laŭgrade samkiel
boao,*

*Flava malario bruligis kiel flamegoj vian korpon,
Per siaj langoj, estingante vian vivon. . .*

*Tiam aperis la blankulo . . .
Li estis multe pli ruza, malica kaj besteca ol ĉiuj
mortoj.*

*Li, per fajrondoj ekstermis viajn batalantojn,
Li perfortis viajn edzinojn kaj fratinojn,
Li malsobrigis viajn fratojn kaj filojn,
Li forrabis senhonte vian oron,
Kontraŭ speguletoj, vitraj brilajetoj. . .*


*En ĉiu vilaĝo tondris la tamtamo,
Portanta terur-sciigon de gento al gento:
"Negro! Viajn gefilojn oni kaptas
Kaj ĵetas ilin en havenŝarĝejojn!
Ilin fremda ŝipo al foraj marbordo forprenas,
En sklavecon al reĝoj de kotono kaj dolardioj!"*

Protesto kontraŭ la Koloniistoj pro la Murdo al Patrice Lumumba

La malnobla murdo al la kongolanda heroo Patrice Lumumba fare de usonaj kaj belgaj novaj kaj malnovaj koloniistoj kaj iliaj agentoj kaŭzis grandan indignon kaj fortan proteston ĉe la ĉina popolo. La registaro de la Ĉina Popola Respubliko tuj faris seriozan deklaron elmontrante, ke

tio ĉi estas senhonta kaj kruela atako farita de la novaj kaj malnovaj koloniistoj reprezentataj de Usono kaj Belgio al la afero de nacia sendependeco de la kongolanda popolo kaj ĉiuj popoloj de Afriko, ke UNO havas neelturneblan respondecon pri tiu ĉi krimo kaj ke la krimuloj ne povos eviti punadon de la kongolanda popolo, de la popoloj de Afriko kaj la pacamaj popoloj tra la tuta mondo. La registaro kaj popolo de Ĉinio firme staras ĉe la flanko de la kongolanda popolo, subtenas ĝian batalon por konservo de la unueco kaj sendependeco de sia patrio, kaj kontraŭstaras la agresadon kaj intervenon de la usona impe-

riismo. En multaj grandaj urboj de Ĉinio centoj da miloj da popolanoj kunvenis por protesti kontraŭ la sanga krimago. Ankaŭ la tutlandaj popolaj organizoj, eminentuloj de diversaj rondoj en Pekino kaj hejmen revenintaj ĉinaj elmigrintoj kunvenis kaj faris deklariojn kaj paroladojn por esprimi sian indignan proteston. En nia ĉefurbo Pekino, ĉiuj oficejoj, institutoj kaj popolaj organizoj duone malhisis la nacian standardon je unu tago por profunde funebri la eminentan gvidanton kaj nacian heroon de la kongolanda popolo ĉefministro Patrice Lumumba kaj la aliajn martirojn.



*Kondamnita al sentemplima torturado,
Penlaborante kiel bruto sub senkompata suno,
Vi estis instruata laŭdegi per kantoj la mastron.
Vi estis krucigata ĉe himnosonoj,
Promesintaj savon en "pli bona mondo".*

*Kaj nur pri unu vi petis,
Ke ili permesu al vi vivi, ke oni lasu vivi . . .*

*Ĉe fajrujo, dum malkvietaj timigaj noktoj
Viaj malklaraj revoj transfandiĝis en tristajn kantojn
Simplajn, sen vortoj, kiel la sopiro . . .*

*Okazis eĉ, ke Negroj, disŝirintaj subite la katenojn
Gaje dancis. Ia juna sentumeco sonis
Sur kupraj kordoj, sur tamburegoj . . .
Tiel el dolorfonto elkreskis potenca muziko—
La jaz-ritmo, kiu ravigis la mondon.
Ĝi devigis la blankulojn estimi vin
Kaj diveni la signifon de via laŭta deklaro:
"Ne la tuta terglobo al vi apartenas!"
Tiu muziko, frato, instigis ankaŭ nin
Suprenlevi la kapojn kaj rigardi en okulojn
De alproksimiĝanta malsklavigo de 1' raso,
Ĝi fariĝis por ni la ĵuro pri libero kaj bonstato,
Ĝi konturigis la aspekton de la bela estonto. . .*

*Nun la varmega ekvatora suno
Startigas el la ĉielo senbridajn flamojn,
Por elvaporigi la sangoriverojn,
Kiuĵ fluas en la tervejnoj,
Por forviŝi la suferombron de niaj brilantaj vizaĝoj.*

*La radioj de liberlumo leviĝas,
Kaj sekigas la larmomaron de l' generacioj—
La larmojn, kiujn elverŝis abunde
Viaj praavoj, martirigitaj sur ĉi bedaŭroplenaj kampoj.*

*Ekstaru do kaj venku mia popolo!
Restarigu nian KONGO-n, liberan, feliĉan,
Tie ĉi, en la koro de l' granda Afriko, la nigra!*

Esperantigis: Jozefo Murĵan

(Daŭrigo de 98p.)

la novelo de Li Ĝun *Ne tiun vojon!* temas pri superado de egoismo kaj de avido je ter-posedadoj; aliloke ni vidas, kiel oni subpremas la sopiron je la persona prospero (Li Ĝun: *Maljunulo Meng Guangtaj*).

Laŭ artisma vidpunkto estas plej elstaraj kaj plej emociigaj la noveloj pri la partizana bataloj kontraŭ la japanoj (Hiaŭ Ping: *La Neĝofloro de Marto*; Vang Juangian: *Partia kotizo*, Ĝang Lin: *Neĝa Tago*), aŭ el la korea milito (Liu Bajju: *Sur la ŝoseo kun leviĝanta polvo*). Pro la grandeco de la celo, por kiu oni batalas, la unu-

opuloj forgesas pri si mem kaj pri siaj familianoj: "Kiom mi valoras?"

La rapidecon de la ekonomia impeto, kiu transpaŝis ĉiun atendaĵon, priskribas la noveloj *Unu jaro* (Fej Liven) aŭ *Tipa ekzemplo* (Li Defu).

El la tempo de la loksidiĝo de l' nomadaj Kazaĥoj kaj kolektivigado de la paŝtejoj estas ĉerpita la temo de la rakonto *Transloĝiĝo de Ĝapolak*, kiun skribis kazaĥa verkisto Kasilkan Kozibajev.

La novaj, socialiste pensantaj homoj, estas prezentataj en la noveloj *Nokta hejmeniro* (Aj Vu), *Mia juna amiko* (Du Pengĉeng) kaj *La maljuna ĉeflaboristo* (Ĝeng

Ŝi). La junaj kaj maljunaj koroj brulas por konstruado de la patrujo.

Ni vidas ankaŭ la renaskiĝon de la vivo inter la naciminoritatoj, en la skizo *La printemp-heroldoj apud la Dian-lago* (Jung Ŝuo), kie indiĝena knabino diras al la verkisto: "Ni estas kvazaŭ mortintoj, kiuj nun reviviĝas".

Tiu ĉi impona, laŭenhave varia libro certe trovos multe da legantoj. En ĝi kuniĝas la ĉarmo de la ekzotiko kun noblaj idealoj kaj streĉa rakontado. Ni esperas, ke plenumiĝos la promeso de la eldonintoj kaj baldaŭ sekvos pliaj volumoj de tiu ĉi meritplena verko.



Impreso pri Pekino

*Prof. Takasugi Iĉiro, membro de
la Japana Lingvoreformo-esplora Grupo*

Je invito de la Asocio por Kulturaj Interrilatoj kun Eksterlandoj de Popola Ĉinio, ni japanaj lingvistoj vizitis nian najbaran landon kaj vojaĝis tra la tuta lando. Nia propra tasko estis studi kiel iras la reformado de skriba-lingvo planita de nova popola registaro, ĉar ni ankaŭ havas la saman problemon en Japanio.

En nia lando, la problemoj estas akre disputataj, sed oni akceptas la skriblingvan reformadon kiel nur teknikan problemon, ĉu konservi la tradician ideografion aŭ latinigi la skriban lingvon.

En Ĉinio, ni estis surprizita ekscii ke ĝi estas akceptata kiel ne nur teknika problemoj, sed ankaŭ grandskala politika kaj kultura revolucio. La reakcia Kuomintang-registaro postlasis al la nova popola registaro nur minusajn kulturheredaĵojn. — Unue la analfabeteco de plimultaj popoloj, due pluraj dialektoj anstataŭ unueca nacia lingvo, trie subpremitaj naciminoritatoj kun mizeraj ekonomioj kaj postlasitaj kulturoj.

La registaro de Ĉina Popola Respubliko decidis konstrui grandegan domon sur firma kaj solida fundamento, kaj prenis sur siajn ŝultrojn pezajn kaj malfacilajn taskojn, forpeli analfabetecon inter popolamasoj, krei unuecan nacian lingvon, kaj suprenigi ekonomian kaj kulturalan nivelojn de naciminoritatoj. La reformado de skriba lingvo estas, en Popola Ĉinio, nedeŝireble kunligita kun tiu grandskala revolucio. Jen estas kial kamarado Maŭ Zedong, la granda politika gvidanto mem interesiĝas pri la lingva problemoj kaj ne malofte

esprimas siajn opiniojn. Jen estas ankaŭ kial lingvaj specialistoj, politikaj organizantoj kaj edukistoj kunlaboras por la solvo de tiu problemoj. Ili iras, al mi ŝajnas, ne rapide, kviete, sed ili antaŭenmarŝas certe kaj senpaŭze.

Unu tagon, ni vizitis la Instituton por Naciminoritatoj en Pekino, kie multnombraj esperplenaj filoj kaj filinoj de naciminoritatoj kiuj venis de diversaj malproksimaj regionoj kune kaj amike studas. Tie, ni konatiĝis kaj interparolis kun gestudentoj vestitaj en siaj propraj naciminoritataj kostumoj. Tie ni vidis, en pensionoj por gestudentoj, diversstilajn preĝejojn aŭ por mahometanoj aŭ por budaistoj. multnombrajn gazetojn kaj journalojn presitajn en diferencaj naciminoritataj lingvoj. Inter pli ol 50 naciminoritatoj kiuj sin trovas en Ĉinio estis eĉ tiaj kiuj ne havis proprajn skribajn lingvojn ĝis kiam la Popola Registaro kreis por ili post la liberigo. Nun, oni ne trafas eĉ unu studenton en la Instituto kiu ne povas legi tagjournalon presitan en sia propra naciminoritata lingvo. Granda kaj malproksima estas la perspektivo de Popola Registaro en la problemoj de skriblingva reformado.

En tiu grandskala kultura revolucio, du ĉinaj esperantistoj ludas gravajn rolojn. K-do Hujucz kaj K-do Je Laiŝi ambaŭ estas la vicdirektoroj de Komitato por Skriblingva Reformo, kiu senpene apartenas al la Popola Registaro. Kiel unu esperantisto, mi estas tre ĝoja kaj fiera pri la faktoj.

En Pekino, ĉie sur stratoj kaj ŝoseoj, ni vidas junajn, malaltajn stratarbojn. Laŭlonge de tiuj vicoj de junaj stratarboj ĝoje kaj fiere marŝas gepioniroj kun ruĝaj kravatoj sur siaj brustoj. Mi amis vidi tiun helan kaj esperplenan pejzaĝon, kaj murmuretis al mi mem — jen estas la simbolo de nova Ĉinio. Pekino estas ja la ĉefurbo morgaŭa.

Kiam ni vizitis Bejhaj-parkon aŭ Sun Jatsen-parkon, mi kredis ke mi estas en la paradizo por infanoj. Ĉie, geknaboj kun ruĝaj vangoj ludas pilkojn, remas boatojn postkuras unu la alian, kantas kaj babiladas, mi ne povas paroli en ĉina lingvo, sed mi ludis pingponon kun ili kaj amikiĝis, ni tre bone komprenis reciproke. Ĉiam mi promenadis sur la fame konata strato nomata Vangfuging, mi trovis librovendejon por geknaboj kaj eniris internen. Sur la ŝrankoj staras nur libroj por geknaboj, kaj sur benkoj ĉe unu angulo sidiĝas ne malmultaj geknaboj unu apud la alia kaj absorbite legas librojn. Ŝajnas ke tie, en la vendejo, oni povas libere preni nove eldonitajn librojn de la ŝranko kaj legi senpage. Sendire oni povas ankaŭ aĉeti libron kaj kunporti ĝin al sia hejmo. La librejo ne estas vendejo en la sama senco kiel tiu de kapitalismaj landoj. Ĝi estas samtempe vendejo kaj malgranda publika biblioteko. Kiel feliĉaj estas geknaboj de Popola Ĉinio, mi diris al mi.

Ĉina Verkista Unio ankaŭ havas sekcion de porinfanaj literaturistoj kun Ĝang Tianji kiel la prezidanto kaj Jan Venging, Hie Binghin kiel vicprezidantoj.



Pri “Ĉina Antologio 1949–1959”

Pumpr

EN la jaro 1925, mi kiel gimnaziano travivis la unuan fojon renkontiĝon kun la ĉina poezio, kiam venis en miajn manojn ĉeĥa traduko de antikvaj ĉinaj versoj fare de Bohumil Mathesius: “Nigra turo kaj verda kruĉo”. Tio estis por mi malkovro de mondo, plena de beleco, de profundaj ideoj kaj de pura, kor-proksima arto, kiu parolis al mi per lingvo komprenebla kaj kortuŝanta el trans la abismoj de la malproksimoj kaj jarcentoj. Ekde tiu tempo mi kun granda ĝojo bonvenigis ĉiun publikajon, kiu alproksimigis al ni la estimindan kulturon de la granda, long-ekzista popolo ĉina.

Poste la jaroj pasis. Sed kiom gravas la jaroj de la homa aĝo, kompare kun la miljaroj de la ĉina historio! Kaj tamen: De post la eldono de la unua tradukaĵo de Mathesius, kiom ŝanĝiĝis la vizaĝo de la Ekstrema Oriento!



Membroj de la sekcio, onidire, energie skribas porinfanajn verkojn kaj kolektas popolajn rakontojn kaj folklorojn. La fakto signifas ke, en Popola Ĉinio, ne nur profesiaj geinstruistoj, sed ankaŭ verkistoj kaj politikaj gvidantoj zorgas pri geknaboj — la junaj arboj de la nova socio.

Mi deziras aplaŭdi kaj ekkrii kun laŭta voĉo, por montri mian elkoran aprobon, “Jes, jes, jes! Pekino, kie oni zorgas pri naci-minoritatoj kaj infanoj, estas ĉefurbo morgaŭa, la urbo de Estonto.”

Fermentado kaj bolado de la vivo socia, politika kaj kultura; revolucio, milito, transpreno de la potenco fare de la laborista klaso; ekonomia antaŭensalto, kiu metamorfozas la fundamentojn de la socio. . . Ĉio ĉi penetradis al ni kiel eĥo tra la filtro de la gazetaraj sciigoj kaj politikaj informadoj.

Tiutempe pruviĝis la utileco de la internacia lingvo, kiu helpas ankaŭ al malproksimaj nacioj, interkonatiĝi sen fremdaj perantoj. Ekde la jaro 1952 mi havis la okazon preskaŭ regule legadi la interesan kaj bone redaktatan esperantan gazeton “El Popola Ĉinio”. La bildo, kiun la ĉinaj amikoj en ĝi prezentadis al ni pri sia patrujo, vidigas tute alian mondon, ol kia estis al ni konata el la antaŭmilitaj publikaĵoj: Klara programo de la nova Ĉinio, la socialismo, estas realigata energie, kun firma fido kaj neŝanceligebla persistemo. La malnovaj civitanaj virtoj: la sperto, lerteco, pacienco kaj diligento, kuniĝis kun la plej moderna tekniko. La celkonscia gvidado de la Komunista Partio de Ĉinio transformadas la surfacon de la tero kaj la pensmanieron de la popolo.

En la servojn de la nova ideo estas metita ankaŭ la tuta kultura aktiveco. La heredaĵo de la klasika pasinteco ricevas novajn valorojn. La malnova idealo de harmonia homo estas potencigita en idealon de nemarĉandema batalanto. La nova Ĉinio ne rezignas pri la malnovaj tradicioj, sed disvolvas ilin

kaj plenigas ilin per nova spirito. Ĝi forlasas la katenojn de la mandarena formalismo kaj ĉerpas el la profundaĵo de la kreaĵ fortoj de l' popolo.

Per tiu ĉi nova spirito de la ĉina kulturo estas plenigita ankaŭ la literaturo de la lastaj jaroj, kiel ni povis ĝin ekkonadi jen el naci-lingvaj tradukoj, jen el esperantaj tekstoj sur la paĝoj de la gazeto El Popola Ĉinio. Sed nun la Ĉina Esperanto-Ligo preparis agrablan surprizon. Post kolekto de noveloj, nomataj “Por nova afero, nova maniero”, ĝi nun eldonis reprezentigan verkon, kiu inde viciĝas al similaj publikaĵoj kolektitaj el alinaciaj lingvoj. Ĝi estas ĝis nun la plej granda esperanta libro aperinta en Ĉinio. Ĝia titolo estas Ĉina Antologio 1949-1959.

La homoj nur malofte interesiĝas pri la statistiko. Tamen la antaŭparolo, kiun por tiu ĉi libro skribis Maŭ Dun, la prezidanto de la Ligo de Ĉinaj Verkistoj, estas legaĵo tre instrua. La Antologio estas elektita kiel specimeno de la literatura kreado nur de la lastaj dek jaroj, la periodo de la rapidega kreskado kaj ĝenerala antaŭenmarŝo. Kaj ni tie legas pri la kvanta alkresko de la literaturaj verkoj en tiu ĉi periodo: En la jaro 1950 aperis 156 literaturaj verkoj, en la jaro 1958 jam 2600; la eldonkvanto estis en la jaro 1950 je iom pli ol 2 milionoj, en la jaro 1958 jam pli ol 39 milionoj da ekzempleroj; la Ligo de la Ĉinaj Verkistoj havis en la jaro 1950 ĉirkaŭ 400 membrojn, en 1959 jam pli ol 3100.

Maŭ Dun mencias ankaŭ la ĉefajn trajtojn, kiuj karakterizas la kvaliton de la nova ĉina literaturo: ĝi estas unue ĝia celo, servi al la popopo; plie la literaturo fariĝas ankaŭ objekto de aktiva intereso de la homamasoj; en la vicojn de la verkistoj eniris laboristoj, kamparanoj, soldatoj; fine videblas granda evoluo kaj ekflorado de la naci-minoritataj kulturoj.

Ni vidas do, ke tiu grandega antaŭensalto, kiun spertis la Popola Ĉinio en la lastaj jaroj, ne

Esperanto Marŝas



Artefaritaj Lingvoj
kaj Maŝintradukado

Fondiĝis Hungara Esperanto-Asocio

Laŭ decido farita en la kunveno de la centra gvidantaro de la Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro je la 30a de oktobro lastjare, ĝi transformiĝis en Hungaran Esperanto-Asocion. Tiu ĉi nova organizo oficiale apartenas al la kultura sekcio de la Landa Konsilantaro de la Sindikatoj.

En la kadro de la kunveno, la reprezentanto de la Ministro por la Kulturaj Aferoj d-ro Lazar Ernö, solene transdonis dekoron "Por la socialista kulturo" kun monpremio al tri malnovaj geaktivuloj de hungara esperantomovado, nome al d-ro Kalocsay

Kalman, Baghy Gyula, Kenesei Maria.

La fondiĝo de HEA donas perspektivon al pli konscia, pli racie planita laborprogramo por la celoj de la hungara esperantistaro: pli emfaze servi al la konatigo de la naciaj kulturvaloroj en eksterlando; pli larĝe, pli sukcese krei rilaton al popolo ĉiulanda por la internacia solidareco; pli faktoriĉe partopreni en la batalo por la tutmonda paco. Jam nun ĝi eldonis monatan informilon *Hungara Esperanisto* kaj planas eldoni en 1961 kvaronjaran ilustritan revuon pri Hungarlando. Daŭran, amikan kaj harmonian interrilaton ĝi petas de ĉiuj esperantaj organizoj kaj esperantistaro de la mondo. Adreso: Buda-pest 4. Pf. 147. Hungarlando.

Fama slovaka lingvisto kaj fakulo en interlingvistikaj demandoj D-ro Horechy, kandidato de filologiaj sciencoj, prelegis en la lasta oktobro en Bratislava pri "La artefaritaj lingvoj kaj maŝintradukoj". Laŭ lia opinio, el multjara kaj longa esplorado de la demando, Esperanto estas la unusola ebla ekzistanta kaj reala solvo en nuntempo por forigi la multlingvecon.

Voĉo de Virinoj

Sub la nomo Voĉo de Virinoj fondiĝis je la 28-a de julio lastjare en Toronto, Kanado, virina movado, kiu celas fariĝi tutmonda. Ĝi volas rezisti al la minaco de milito per pozitivaj agoj kaj kontribui senpartie al politika malstreĉiĝo inter la grandpotencoj. Ĝi intencas praktike apliki Esperanton por la paco. Ĝia adreso: Voĉo de Virinoj, P.O. Box 88. Port Credit, Ontario, Kanado.

restis limigita nur je la kampo ekonomia, sed ĝi manifestiĝis ankaŭ sur la kampo kultura.

La Ĉina Antologio, kiu nun estas en niaj manoj, estas laŭ promeso de la eldonintoj la unua volumo, kiun sekvas pliaj. Tiu ĉi volumo ampleksas specimenojn el la verkoj de 30 poetoj kaj novelistoj, nome 21 poemojn, 16 novelojn kaj 3 skizojn. Ĝi estas zorge redaktita kaj enhavas biografiajn notojn kaj komenton, kiu faciligas la komprenon de iom malproksimaj temoj. Ĉe la tradukado partoprenis la meritplenaj ĉinaj esperantistoj: S. J. Zee, Pandiŝo, Censinio, Yang Yongsen, Laŭlum, I. Ko kaj Honfan. La lingvan kontrolon faris Ĉ. Ĉen kaj J. S. Zee.

La lingva nivelo estas tre bona kaj por ni, eŭropaj esperantistoj, instrua, se oni konsideras la diferencojn en la strukturo de la

lingvo, el kiu la libro estas tradukita. Certe estas menciinde, ke la ĉinaj tradukantoj sekvas la postsignojn kaj la tradiciojn de la Zamenhofa lingvouzo, koncerne la kompleksajn verboformojn, pri kiuj oni lastatempe tiom diskutadis en la esperanta preso.

En tiu ĉi mallonga artikolo ne estas eble trakti kaj taksu la unuopajn poemojn kaj novelojn de la Antologio. Mi volas halti almenaŭ ĉe kelkaj el ili:

La poezian parton enkondukas versoj de Maŭ Zedong pri la legenda Granda marŝo, en kiuj estas en poezie rafinita maniero aplikata la malnova ĉina stilo, kun aludoj, duondiĝoj kaj ideaj mallongigoj, per kio la poemo ekhavas tre potencon esprimforton. Baladan impreson donas la poemo de Feng Ĝi pri la brulligno-kolektisto, kiu frostmortis en la arbaro kaj nun lia fantomo vagadas

tra la regiono, instigante al revenĝo kontraŭ la kruela bienposedanto. Ofte trovebla temo estas la konscio pri la propra forto:

*Kio tremigas la montrokojn
Sur la vasta teritorio?*

*Ne uragano, ne torenta pluvo,
Sed la paŝoj de laboristoj.*

— Tian Gian: Laŭdkanto por la patrolando

Ĉiu poezio kaj prozo estas tendenca — jes ja! Ĉar ĉio estas subigita al unusola ideo: metamorfozo de la naturo kaj de la homa menso; edukado al kolektivisma pensmaniero kaj al la konscio pri la respondeco. Tiel en la rakonto de Ma Feng *Antaŭscio pri tri jaroj* estas bone prilaborita la temo, kiel maljuna sagaculo estis edifita je devkonscia kooperativano; en

(Daŭrigo sur 95p.)



Vivaj Fragmentoj en la Kampara Popola Komunumo

1. En komunuma manĝejo
2. Diskutado pri verkado dum ripozo
3. Postlabora amuzado ĉe la kamprando
4. En infanĝardeno

Fotoj de Hinhua



NOVAJ ĈINAJ POŝTMARKOJ

PRI KRIZANTEMO

